

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

101-a jaro • n-ro 1220 (12) • Decembro 2008

La 40-a Korea Kongreso



**Pli alten
kun ALTE**

**Kongresa
Komuniko 1**

**Membroservado
kaj celoservado**

**Ralph Harry:
persona omaĝo**



Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 36);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,50.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org
TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

243 ... Malferme: Pli alten kun ALTE (Zsófia Kóródy)

244 ... Kongresa Komunikilo 1. 94-a Universala Kongreso de Esperanto

245 ... L.L. Zamenhof: Sojle de la 150-jariĝo (Barbara Pietrzak)

246 ... Faka agado: Esplori eblajn manierojn plifortigi kaj utiligi la fakan
aplikon (Marcos Cramer kaj José Antonio Vergara)

247... Ĉu ekzistas modernaj sciencaj kaj teknikaj esprimoj en Esperanto?
(László Szilvási)

248 ... Forumo: Membroservado kaj celoservado: kontribuo al la diskuto
pri la membraro de UEA (Humphrey Tonkin)

249 ... Belartaj Konkursoj de UEA en 2009: Kia estu la eseo? (Detlev Blanke,
Gian Carlo Fighiera kaj Gotoo Hitoshi)

250 ... Ralph Harry – persona omaĝo (Probal Dasgupta)

251 ... Institucio Hodler 40-jariĝis (GaKo); Krucenigma konkurso (Stano
Marček)

252 ... Recenzoj: Seán Ó Riain pri *Concise Encyclopedia of the Original
Literature of Esperanto*

253 ... Gonçalo Neves pri *La lingvo serena*

254 ... Avo Frosto respondos en Esperanto! (Normand Fleury)

255 ... Laste aperis

256 ... Oficiala Informilo; Anoncetoj

257 ... Loke – Fake – Persone: Ukrainio (Tatjana Auderskaja); Bulgario;
Aŭstrio (Walter Klag); Vjetnamio; Instruado (Atilio Orellana Rojas);
Tolkien; Bociort (I.O.)

258 .. Tra la mondo: La 40-a Korea Kongreso (Kim Uson)

259 ... La 95-a Japana (Egawa Harukumi); Unuigitaj per la reto (Augusto
Casquero)

260 ... Forpasoj

261 ... Jarfina indekso

KOVRILPAGE: Partoprenantoj de la 40-a Korea Kongreso de Esperanto
(legu pli sur la p. 258). Foto: Kim Yongjin

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (kunordigo, ĝenerala
planado):** Prof. Probal Dasgupta, LRU,
Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road,
IN-700108 Kolkata, Barato; ☎ +91 33 2359
7731; ✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj):
D-ro ing. Ranieri Clerici, Via Conte
Verde 66, IT-00185 Roma, Italio;
☎ +39 333 255 19 04, ✉ +39 06 97 600 326;
✉ ranieri.clerici@tin.it.

**Vicprezidanto (kulturo, kongresoj,
edukado):** S-ino Claude Nourmont,
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,
Luksemburgio; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado): S-ino
Barbara Pietrzak, Ul. Międzynarodowa
38/40a m 217, PL-03-922 Warszawa,

Pollando; ☎ +48 22 252 79 21 [h],
✉ +48 6000 51 425; ✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Loes
Demmendaal, Duikerlaan 160, NL-2903 AC
Capelle aan den IJssel, Nederlando; ☎ +31
10 213 33 20; ✉ L.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ro Hori Jasuo,
10-27 Simosinden-mati 10-27, JP-371-0822
Maebasi-si, Gunma-ken, Japanio;
☎/✉ +81 27 253 2524;
✉ hori-zonto@water.sanmet.ne.jp.

Faka kaj scienca agado: S-ro José Antonio
Vergara, Casilla 508, Puerto Montt, Ĉilio;
☎ +56 65 256660 [h], +56 65 344606 [of],
✉ +56 994521017;
✉ joseantonio.vergara@gmail.com.

Observanto de TEJO: S-ro Gregor Hinker.

Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.

Pli alten kun ALTE

ALTE estas la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo, fondita en 1990, ekde 2004 Internacia Neregistara Organizaĵo (NGO), nuntempe kun 31 plenrajtaj membroj, reprezentantaj 26 eŭropajn lingvojn.

Giaj asociaj, aligitaj kaj individuaj membroj zorgas pri unuecaj, kompareblaj lingvotestaj sistemoj, provizas per normigitaj testoj, ellaboras la metodologion de mezurado de fremdlingvaj kapabloj, akordigas testojn al la bezonataj mezurendaĵoj ĉu por lernejoj, akademioj aŭ aliaj fakaj celoj.

La membreco, reprezentiĝo ĉe ALTE, signifas renomon esti parto de internacia kunlaboro, agado laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), rekomendo de la Konsilio de Eŭropo por lingvolernado, instruado kaj pritaksado.

Lernejoj, universitatoj, ekzamsistemoj adaptis kaj daŭre adaptas siajn instrumaterialojn, lernolibrojn, teststrukturojn al la 6-grada postularo difinita laŭskale inter A1 kaj C2.

La Hungara Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK, membro de ALTE de 1999), kie Esperanto estas tradicie unu el la lingvo-ofertoj, frue reagis: en 2000 ĝi plenumis la akreditajn postulojn priskribitajn de la Akredita Manlibro de Konsilio de Eŭropo kaj ricevis ŝtatan rekonon de la Lingvoekzamenojn Akreditanta Korporacio NYAT. En 2006 ĝi adaptis sian trinivelan sistemon al la 6-grada: la elementa fariĝis B1, la meza B2 kaj la supera C1, kio kompreneble ekvalidis ankaŭ por la lingvoekzamenoj pri Esperanto.

Fariĝis defio ankaŭ por la internacia Esperanto-movado sekvi la ŝanĝojn en lingvoinstruado kaj testado. Internacia laborgrupo de spertuloj komencis sekvi la novaĵojn, ekkoni la postularon de KER, serĉi vojojn al rekono por la lingvo Esperanto. La permeso venis de Konsilio de Eŭropo.

Katalin Kováts kunordigis la tradukadon de la Komuna Eŭropa Referenckadro en Esperanton kaj UEA eldonis ĝin en decembro 2007.

Sekva grava evento okazis en Cambridge, en aprilo 2008, kie UEA/ILEI estis reprezentita de Zsófia Kóródy en la ALTE-konferenco. UEA estis akceptita kiel aligita membro de ALTE kaj ricevis la inviton prezenti sin en la jarkunveno dum la fakkonferenco en Lisbono, Portugalio, inter 11 kaj 14 novembro. La UEA-komisiito Zsófia Kóródy per 15-minuta

projekciado informis la ALTE-delegitojn pri la strukturo, agado, atingoj de nia mondorganizaĵo, raportis pri Esperanto-instruado kaj prezentis sin ankaŭ en laborgrupoj de ALTE, okupiĝantaj pri normigo de testoj por junaj lernantoj kaj pri instruista trejnado. Per ŝia aktiva kontribuado UEA estis ekkonita ankaŭ en la paralele organizita konferenco de EAQUALS (organizaĵo por kvalifiki lingvolernejojn kaj instrukapablajn kursojn).

En kreskanta bezono akceptigi, egalvalorigi Esperanton, la nuna dunivela Esperanta ekzamenoferto ne sufiĉas. Por la strebado al akreditado estis elektita kiel modelo la jam akreditita ekzamsistemo, superirigardita de ALTE: la hungara kiel fremda lingvo. UEA fariĝis partnero de ITK: estis ellaboritaj, prov-testitaj serioj en 3 niveloj (B1, B2, C1). Dank' al kelkara sindona laboro de internacia teamo (ĉefe Pálma Salomonné Csizsár, Márta Kovács, Katalin Kováts, Zsófia Kóródy), la Esperanto-movado ekhavas lingvotestan sistemon taŭgan por kompari la lingvajn kapablojn kun tiuj en aliaj fremdaj lingvoj.

La nivelon kaj kvaliton garantias laŭ la KER-postuloj spertaj ekzamenantoj, trejnitaj de ITK-fakuloj, kiuj akceptis gvidi la unuan kurson en Roterdamo dum UK 2008, kaj gvidos kun Zsófia Kóródy la sekvan sesion en decembro 2008 en Interkultura Centro Herzberg, Germanio.

Alvoko al lingvolernantoj, parolantoj: estas konsilinde amase ekzameniĝi laŭ tiuj novaj modeloj, por fiere pruvi la egalvaloron de Esperanto. Ekzamenoj B1, B2 kaj C1 laŭ la KER-normoj povas regule okazi ĉefe dum grandaj internaciaj renkontiĝoj.

Zsófia Kóródy



UEA estis akceptita kiel aligita membro de ALTE kaj ricevis la inviton prezenti sin dum la fakkonferenco en Lisbono, Portugalio, inter 11 kaj 14 novembro 2008. Zsófia Kóródy (maldekstre) raportas pri internaciskala lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado al prestiĝa grupo de fakuloj.



Kongresa komuniko 1

94-a Universala Kongreso de Esperanto

Bjalistoko, Pollando, 25 julio – 01 aŭgusto 2009

Konstanta adreso

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Tel.: +31 (0)10 436 1044; fakso: +31 (0)10 436 1751.

Retadreso: kongresoj@co.uea.org.

TTT: http://www.uea.org/kongresoj/uk_2009.html.

Kongresa temo

La temo de la 94-a UK estas „*Krei pacan ponton inter la popoloj*“. *Zamenhof hodiaŭ*. La vortumo, kiu citas el la parolado de Zamenhof en la Kembriĝa UK en 1908, ligas la Bjalistokan UK al la 150-a datreveno de lia naskiĝo kaj al la Internacia Jaro de Interpaciĝo.

Informoj

La modela retejo de LKK enhavas multe da interesaj informoj pri Bjalistoko, Podlaĥia vojevodio, Pollando, transporto ktp. Ĝia adreso: <http://94uk.bialystok.pl/>. Por aliĝoj kaj mendoj servas la ĝenerala kongresa retejo de UEA: http://www.uea.org/kongresoj/uk_2009.html.

Kongresejoj

La ĉefa kongresejo estos la Bjalistoka Politekniko. Apud ĝi estos starigitaj tendego funkcionta kiel salono Zamenhof kaj gastronomia tendo kun malmultekostaj manĝaĵoj.

Vojaĝado

La ĉefa flughaveno por atingi Bjalistokon estas tiu de Varsovio. De la flughaveno veturas aŭtobus(et)oj rekte al Bjalistoko. Estas ankaŭ rekta trajnkonekto (ĉ. 2h30) inter Varsovio kaj Bjalistoko.

Loĝado

Detalaj informoj aperos en la *Dua Bulteno*. La oferto varios de 5-stelaj ĝis modestaj, familiecaj hoteloj, kun aparte multaj lokoj en studentaj loĝejoj.

Ekskursoj

En la *Dua Bulteno* aperos priskriboj pri la antaŭ-, post-kaj dumkongresaj ekskursoj. Inter la vizitotaj lokoj estas Varsovio, Krakovo, naciaj parkoj, k.a. historiaj kaj naturaj vidindaĵoj. Dum la semajno pluraj ekskursoj konatigos kun la kongresurbo kaj la ĉirkaŭa regiono.

Internacia Kongresa Universitato

La limdato por proponi prelegon por la 62-a sesio de IKU estas 2009-01-31. Pri kondiĉoj bv. vidi la anoncon en la oktobra numero (p.211). La proponojn oni sendu al la sekretario, prof. Amri Wandel, PK 767, IL-71799 Makabim, Israelo; tamen prefere rete: amri@huji.ac.il.

Infana Kongreseto

Dum la UK okazos la 40-a Internacia Infana Kongreseto en Supraśl apud Bjalistoko. Pli da informoj ĉe la komisiito Bert Schumann, *bert.schumann@free.fr*, kaj en la retejo <http://bertosch.free.fr/iik2009/index.html>.

Reklamiloj

La *Unua Bulteno* estas ankoraŭ havebla ĉe UEA. La kongresa afiŝo estas elŝutebla ĉe <http://www.uea.org/bildoj/uk2009/afisho.jpg>. La Libroservo de UEA vendas glumarkojn;



Palaco de Rudygier en Bjalistoko, la sidejo de Altlernejo de Publika Administracio.

10-marĉa folio kosta € 1,20 (rabato de 1/3 ekde 3 ekz.; aldoniĝas sendokostoj kaj, en EU, imposto de 19%).

Aliĝilo

La aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe UEA, kiu volonte liveros ĝin grandkvante por distribuado kun gazetoj kaj en E-aranĝoj. Eblas elŝuti ĝin ĉe la kongresa retejo, kie eblas ankaŭ rete aliĝi al la UK.

L.L. Zamenhof: Sojle de la 150-jariĝo

La ĉi-jara 15-a de decembro estas aparta dato, sojl-signanta gravan venontjaran jubileon, la 150-an naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto, d-ro Ludoviko L. Zamenhof.

En la E-komunumo ni frontas do la Jaron de Zamenhof, kiu estos okazo, per multaj niaj iniciatoj memori en niaj medioj kaj ankaŭ en la ekstera mondo la figuron de d-ro L.L. Zamenhof kaj lian mesaĝon. Unuavice por disvastigi kaj pli vastskale proponi Esperanton kiel ponton por la diverskultura homaro, kiel ponton al pli paca mondo. La antaŭa samgrava rondcifera jubileo estis lia 100-a naskiĝdatreveno, festita en la jaro 1959. Apresante la atingajojn de la E-movado en la mondo la Plenuma Komitato de Unesko agnoskis tiam Ludovikon L. Zamenhof unu el la grandaj figuroj de la homaro.

Ĉi-jare laŭ iniciato de la pola delegitaro ĉe Unesko, subtenate de litovaj delegitoj kaj kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio, la 15-an de decembro en la pariza Unesko-sidejo okazos solenaĵo omaĝanta la memoron de d-ro L.L. Zamenhof. Ĝi estas digna enkonduko al nia Jubilea Jaro 2009.

Tiaj eventoj puŝas nin al laŭvicaj agadoj sur malpli altaj ŝtupoj, en niaj medioj, urboj kaj landoj. Jam de multaj monatoj, ekde kiam la Estraro en la Jokohama UK alprenis la decidon kongresi dum la Jubilea Jaro en la naskiĝurbo de d-ro L.L. Zamenhof, la rigardo de esperantistoj ĉiam pli ofte direktiĝas al Bjalistoko. Tie iniciatoj multas.

Unu el ili, komenciĝinta en la unuaj tagoj de novembro, rilatas al la E-Centro kaj Muzeo de Ludoviko Zamenhof. La unua, kiu revis pri la muzeo de la kreinto de la Internacia Lingvo en lia naskiĝurbo, estis la ĉefmotoro de la E-movado en Bjalistoko Jakub Szapiro, kiu lanĉis tian ideon jam en la

Kotizoj

Ĝis 2008-12-31 validas (interkrampe kotizoj laŭ tarifo B): Individuaj Membroj de UEA (ne MG) €160,00 (120,00); MG aŭ ne-IM de UEA €200,00 (150,00); Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, IM de UEA, €80,00 (60,00); Kunulo/junulo/handikapulo, ne-IM de UEA, €120,00 (90,00). Infanoj kaj junuloj naskiĝintaj post 1988-12-31 aliĝas senpage (bv. sendi kopion de prua dokumento!).



jaro 1919. Ne realiĝis la E-Centro, por kiu oni alvokis okaze de la Varsovia UK en la jaro 1987.

Nun tamen la ideo de la Centro efektiviĝas. En Bjalistoko komenciĝis alikonstruoj de la brikdomo destinita de la urbo por tiu celo. La laboroj, kies kosto egalas al 6,2 milionoj da zlotoj estas financataj el la buĝeto de la urbo. La Centro kaj la muzeo disponos pri la surfaco de 300 kvadrataj metroj, sur kiu troviĝos multimedia ekspozicio dediĉita al Ludoviko Zamenhof, biblioteko, legejo kaj konferenca salonego. Ĝi gvidos esplorojn pri la problemoj de la lingva komunikado. La estonta biblioteko jam riĉiĝas per libroj venantaj el la tuta mondo.

La fino de la renovigaj laboroj estas planita por la 15-a de junio 2009. Bjalistoko kaj bjalistokanoj ne forgesas pri sia fama civitano, elektita en plebiscito de *Gazeta Wyborcza* en 2000 „Bjalistokano de la 20-a jarcento“.

Barbara Pietrzak



100 jaroj
universala
esperanto-
asocio

Faka agado

Esplori eblajn manierojn plifortigi kaj utiligi la fakan aplikon

Tre bonŝance kaj instige, la iniciatoj informaj kaj subtenaj al la Esperantlingva Vikipedio trovis fruktodonan, vere entuziasm(ig)an terenon dum la lasta UK en Roterdamo kaj daŭre viglas tra Esperantujo (ekz. dum la ĵusa KAESt, flanke de e@i).

La rimarkebla ĉeesto de nia lingvo kaj ties parolkomunumo en tiu medio estas surprize kontrasta al la ĝenerala malbonfarto de la tradiciaj fakaj asocioj, unu el kies ritare deklaritaj celoj estis ĝuste disvastigi Esperanton en la unuopaj fakmedioj kaj utiligi ĝin fake. La realo tamen estas ke pluraj el ili, malgraŭ diverskvalitaj atingoj, estas nuntempe trafitaj de la samaj problemoj kiel la ĝenerala movado, nome demografia maljuniĝo, izoliteco, fermiteco kaj prestiĝomanko de Esperanto, kiel konstatis la Subkomitato pri Scienca kaj Faka Agado raporte al la Komitato de UEA en nia lasta UK.

Oni do devas subteni la alvokon de la Subkomitato al la fakaj asocioj prioritati la evoluigon kaj pliriĉigon de la propra fako en la Esperantlingva Vikipedio.

Aldone al tio, ni volas ĉi tie prezenti novan iniciaton, nome la kreon de Esperantlingva Vikiversitato. Vikiversitato estas unu el la *frataj* projektoj de la Vikipedio (ĉar ĝin funkciigas la sama fondaĵo, nome la Wikimedia Fondaĵo). La diferenco disde Vikipedio estas, ke en ĝi oni ne kreas enciklopediajn artikolojn, sed kursojn por instrui certajn fakojn kaj kunigas esplor-

agadon. La Vikipedio aliflanke klare malpermesas publikigon de propra esploro.

La ekzisto de Esperantlingva Vikiversitato apud la Esperantlingva Vikipedio estus bona kompletigo por la sukcesa kunordigo kaj videbligo de faka Esperanto-agado en Interreto.

La Vikiversitato estas retpaĝaro, en kiu eblas facile aperigi fakajn artikolojn kaj kursojn, en kiu eblas kontakti sam- aŭ alifakajn kunlaborantojn, en kiu eblas publike diskuti pri diversaj aspektoj de faka agado inkluzive de la terminoj, kaj publikigi terminarojn (unuflanke terminarojn preparitajn per diskuto en la Vikiversitato kaj aliflanke terminarojn preparitajn ekster la Vikiversitato).

Ĉio ĉi estas faciligita pro la viki-teĥniko, kiu ebligas ke ĉiu ret-uzanto povu facile kontribui al la retpaĝaro sen teĥnikaj baroj. Ankaŭ Vikipedio funkcias kiel vikio. Tamen ĝia celo estas la kreo de enciklopedio. Eble, kelkaj fake agantaj esperantistoj volas ne nur verki enciklopediajn artikolojn, sed ankaŭ aliajn tekstojn, ekz. enkondukajn kursojn aŭ fakajn artikolojn, kiuj eble eĉ prezentas la rezultojn de propra esploro. Ĉar en la nuna mondo eblas tre facile atingi multajn homojn pere de interreto, estus tre bone havi interretan platformon por kunordigi la retan fakan agadon. Por tio aparte taŭgas la Vikiversitato.

Grava avantaĝo de la Vikiversitato estas tio ke ĝi estas jam ekzistanta retpaĝaro. Necesus nur fondi apartan Esperantlingvan sektion de ĝi. Tio ŝparas al ni la malfacilan kaj temporaban taskon mem krei retpaĝaron, kiu ebligu facilan aperigon de fakaj artikoloj, kursoj kaj terminaroj, kaj kiu entenu diskutforumon kaj eblon persone kontakti aliajn uzantojn. Ĝis nun ankoraŭ ne estis kreita aparta vikio por la Esperanta Vikiversitato, sed se troviĝas sufiĉe da kunlaboremuloj, certe estus facile konvinki la respondeculojn de la Wikimedia Fondaĵo krei ĝin (ili ja konscias pri la sukceso de la Esperanta Vikipedio). Jam nun eblas eklabori pri Esperanta Vikiversitato sur la vikio beta.wikiversity.org (tie ĉiuj, kiuj celas krei Vikiversitaton en nova lingvo, devas komenci la laboron, por pruvi ke estas sufiĉe da kunlaboremuloj en tiu lingvo).

En la Vikiversitato povas esti subpaĝaroj pri apartaj fakoj. Tio povas plifaciligi la kunlaboron inter esperantistoj de unu fako, kaj povas samtempe ebligi al ĉiu E-lingvano kontakti alian ligitan al iu fako. Por la fakoj, por kiuj ne plu ekzistas (aŭ



Vikipediumado dum la lasta KAESt. Foto: Petro Chrdle

neniam ekzistis) aktiva faka asocio, la tiufaka subpaĝaro en la Vikiversitato povas esti taŭga alternativo al tradicia faka asocio. Por la fakoj, por kiuj daŭre ekzistas aktiva faka asocio, la tiufaka subpaĝaro en la Vikiversitato estu nur komprenata kiel kompletigo, ne kiel konkurenco al la faka asocio.

Pliaj detaloj pri la projekto Vikiversitato legeblas sur la jenaj retpaĝoj:

- angle: en.wikiversity.org/wiki/WV:IS
- france: fr.wikiversity.org/wiki/WV:CqeW
- itale: it.wikiversity.org/wiki/Wikiversità:Cos'è_Wikiversità
- japane: ja.wikiversity.org/wiki/Wikiversity:ウィキバーシティとは何か
- hispane: es.wikiversity.org/wiki/Wikiversidad:Que_es_la_Wikiversidad
- germane: de.wikiversity.org/wiki/Wikiversity:Über_Wikiversity



Sur tiuj paĝoj estas precizigitaj la funkcimaniroj de la unuopaj Vikiversitatoj; la Esperantlingva Vikiversitato povus havi iomete alian funkcimaniĝon, por taŭgi al la bezonoj de la faka Esperanto-agado. Ankaŭ jam ekzistas provizora enirpaĝo por la kreata Esperantlingva Vikiversitato:

beta.wikiversity.org/wiki/Ĉefpaĝo.

Ni do serĉas aliajn esperantistojn, kiuj emas pridiskuti la proponon kaj

engaĝiĝi en la kreo de esperantlingva versio de Vikiversitato. Esperanto ĉiam estis ilo por eduki la homojn, por demokratiigi la sciojn. En la nova, interreta epoko, ni fiere kaj trafe daŭrigu tiun honorindan tradicion.

Marcos Cramer

marcos.cramer@gmail.com

kaj **José Antonio Vergara**

joseantonio.vergara@gmail.com

Ĉu ekzistas modernaj sciencaj kaj teknikaj esprimoj en Esperanto?



Jam delonge ne tio estas la demando, ĉu Esperanto estas uzebla en scienco kaj tekniko. Nuntempe la demando estas, kiumaniere, per kiu vojo la Esperantaj faklingvo kaj terminologia laboro povus postkuri la ritmon de la tre rapida teknika kaj teknologia evoluo?

Dum la ĉi-novembra tradicia Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, KAEST, en Ĉeĥio kunvenis kvindek da fakuloj, terminologoj, sciencistoj, inĝenieroj kaj simplaj interesigantoj el 13 landoj (BE, BG, GB, CZ, DK, DE, HU, IT, LT, NL, PL, RU, SK) ne nur por trakti la ĉi-supran demandon, sed ankaŭ en la praktiko elprovi la lingvon en diversaj fakaj temoj.

Oni ĝuis dekkvinon da interesaj prelegoj kun orekaptaj temoj: de orientiĝo de submaraj aŭtonomaj robotoj tra teknika funkciado de modernaj varmo- kaj elektrocentraloj ĝis funkciado de scienca kaj teknika Esperanto-biblioteko...

La partoprenantoj ne nur aŭskultis kun ĝojo la prelegojn kaj diskutis pri diversaj terminologiaj problemoj, sed en aparta Vikipedi-trejnseminario, gvidata de Pavla

Dvořáková, ankaŭ en praktiko oni lernis la manipuladojn kaj kompletigon de la Esperanta Vikipedio.

La aranĝo KAEST, dum dek jaroj sindone flegata kaj profesie prizorgata de Petr Chrdle, jaron post jaro iĝis pli populara, kaj nun ĝi jam elkreskis el sia strukturo. Post laŭda danko al la ĝisnuna organizanto la partoprenantoj akceptis la inviton al la urbeto Modra-Harmónia apud Bratislava en Slovakio, kiel la estonta loko de KAEST-oj organizotaj de Peter Baláž, respektive lia firmaeto „Espero“ kunlabore kun e@i.

László Szilvási



Partoprenantoj de la ĉi-novembra KAEST. Foto: Petro Chrdle



100 jaroj
universala
esperanto-
asocio

Membroservado kaj celoservado: kontribuo al la diskuto pri la membraro de UEA

**En la novembra revuo
Renato Corsetti kaj Barbara
Pietrzak malfermis la diskuton
pri la UEA-membraro.
Al la diskuto nun kontribuas
la eksprezidanto de UEA
prof. Humphrey Tonkin.**

Mi estas membro de pluraj organizaĵoj en mia propra lando. Kelkaj liveras specifajn servojn: la asocio de ĉirkaŭloĝantoj de la lago kie situas mia domo prizorgas la akvokvaliton kaj traktas kun niaj urbaj instancoj; la asocio de fakuloj pri Renesanco liveras al mi fakan revuon, organizas konferencojn kaj tenas min informita pri tiu aspekto de mia profesia studkampo; la nacia asocio de pensiitoj (de kies membraro granda parto fakte ne estas pensiitoj, inkluzive min) helpas reprezenti miajn rektajn interesojn antaŭ la registaro kaj ebligas al mi diversajn rabatojn ekzemple kiam mi vojaĝas. Ĉe aliaj organizaĵoj, en kiuj mi membras, mi malmulton mem ricevas, sed la laboro de tiuj organizaĵoj estas direktata al agadoj kiujn mi aprobas aŭ kiujn mi deziras subteni: la unio pri civilaj liberecoj, Amnestio Internacia, la asocio „Savi la Infanojn” k.s. Tiuj organizaĵoj sendas al mi ĉiujare mian membrokarton, kaj foje tiu karto rezultigas kelkajn servojn, sed esence la koncernaj asocioj servas min en tio, ke ili servas aliajn homojn. Kaj, se ili nomas min membro, ili ankaŭ postkuras nemembrojn kaj same petas de ili subtenon por diversaj iniciatoj.

Evidente temas pri du malsamaj specoj de asocioj. La unua ekzistas por kaj pro siaj membroj kaj liveras al ili servojn; la dua ekzistas por fronti difinitan problemon kaj bezonas la subtenon de apogantoj (kiujn ili foje nomas „membroj”) por atingi tiun celon. Ni nomu la unuan kategorion „membroservaj organizaĵoj” kaj la duan „celoservaj organizaĵoj”.

En lastaj jaroj, almenaŭ ĉe ni, okazis granda kresko de organizaĵoj en tiu dua kategorio. Ili ne nur petas, ke mi fariĝu membro, sed, se mi tion faras, ili de tempo al tempo petas de mi pliajn kontribuojn por atingi difinitan rezulton – akceptigo de difinita leĝpropono, financa helpo por solvi difinitan krizon en iu parto de la mondo aŭ por reprezenti



iun politikan malliberigiton antaŭ kortumo, k.s. Mi donacas tiom kiom mi povas, ĉar mi kredas je la valoro de tiuj agadoj. Ofte ilia laboro havas interretan bazon kaj oni povas kontribui al ili per la reto.

UEA havas unu piedon en ambaŭ terenoj: ĝi liveras servojn al la membroj kaj do estas membroserva asocio, sed ĝi ankaŭ ekzistas por (laŭ sia statuto) „disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto”, por „agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon” kaj por „plifaciligi la ĉiuspecajn spiritalajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso,

sekso, religio, politiko aŭ lingvo”. Oni povus argumenti, ke tiuj tri celoj (el la kvar statutaj celoj de la asocio) estas pli gravaj kaj ricevas pli da statuta emfazo: laŭ sia statuto UEA estas unuavice celoserva asocio kaj nur duavice membroserva.

Se oni rigardus atente la membrostadistikojn kaj la agadon de la asocio, oni povus ricevi tute malan impreson. Notinda proporcio de la membroj fariĝas membroj pro tio, ke ili partoprenas Universalan Kongreson (servon de UEA): en jaroj kiam ili ne iras al UK, ili simple ne membras. Efektive, la membraro de UEA estas multe malpli stabila ol ĝi unuavide ŝajnas esti: homoj envenas kaj eliras, depende de la avantaĝoj, kiujn UEA proponas al ili. Aliflanke, ankaŭ la homoj, kiuj ne membras en UEA, sentas sin iel ligitaj al ĝi: la influo de UEA kaj eĉ la homa partopreno de ĝia agado, etendiĝas preter la efektiva membraro. Restas konstanta nur malgranda grupo de fideluloj, al kiu la asocio dediĉas grandan atenton pro timo, ke, se ĝi ne faros tion, ĝi perdos tiujn membrojn. UEA do klopodas liveri al tiuj homoj servojn, kiujn ili ne povus trovi ekster UEA. Oni argumentas, ke, sen tiuj membroj, UEA perdos sian financon bazon. Aliflanke, ĝi laboras tiel forte por teni tiun bazon, ke ĝi donas nesufiĉan atenton al aliaj aferoj.

Iam oni apenaŭ povis aktivi internacie sen esti membro de UEA: oni bezonis la informojn, kiuj venis kun tiu membreco (la revuo, la jarlibro k.s.). Sed la teknologia

evoluo kondukas al situacio, en kiu aktiva esperantisto povas trovi tiujn informojn ekster UEA, precipe per aliro al interreto. Do, neeviteble la financa bazo, kiun donas la membraro, malgrandiĝos, eventuale eĉ al nuliĝo.

Bedaŭrinde, en lastatempaj diskutoj pri membreco kaj UEA, la homoj emis dividi sin en du tendarojn: tiujn, kiuj predikas transiron al reta komunikado kaj forigon de la papera, kaj tiujn, kiuj emfazas la bezonon teni la tradiciajn paperaĵojn pro tio, ke multaj homoj ne utiligas interreton. La dua kategorio emas rezisti klopodojn enkonduki retajn servojn ĉar ili estas malegalecaj. Verdire ambaŭ tendaroj ekiras el falsaj premisoj: necesas ambaŭ vojojn sekvi – kaj ne nur. Ni nepre bezonas pli efikan utiligon de la reto, ne nur per simpla transigo de kelkaj niaj iamaj servoj al reta formo, sed per kompleta rekonceptado de nia komunika strategio. Samtempe ni devas modifi nian nunan agadon por liveri plej utilajn servojn al niaj „paperemaj” membroj.

Tamen, unuavice necesas transformi la asocion el membroserva al celoserva organizaĵo, en kiu ni lanĉas

efikajn kampanjojn por disvastigi la lingvon, proponi ĝin kiel solvon de lingvaj problemoj, kaj faciligi la interhoman komunikadon – samtempe konstante memorigante niajn subtenantojn pri la efikeco de nia laboro kaj petante de ili financan apogon por tiu laboro. Por fari tion, ni devas komuniki niajn mesaĝojn al multe pli vasta reto de homoj ol nia tute malgranda formala membraro – eble kreante novajn membrokategoriojn, eble celante krei novajn klientojn por niaj varoj (varoj, kiuj inkluzivas la disvastigon de Esperanto aŭ la solvado de lingvaj problemoj – ĉar tiuj estas spiritaj varoj same vendeblaj kiel libroj aŭ revuoj).

Por fari tion, ni ne hokiĝu al kompara membrostatistiko, sed emfazu nian kapablon mobilizi la homojn ĉirkaŭ farindan laboron: ni celu rezultojn, ne membrojn simple por havi membrojn. Tiun transiron ni planu zorge por konservi nian financan bazon, sed nia ĉefa celo estu servi al la tuta esperantistaro per tio, ke ni servas al iliaj plej karaj celoj.


Humphrey Tonkin

Belartaj Konkursoj de UEA en 2009

Kia estu la eseo?

**La Belartaj Konkursoj havas
longan tradicion kaj bone
helpas trovi talentulojn.
Al la Konkursoj apartenas
ankaŭ la branĉo „Eseo“.**

Pro tio jen kelkaj komentoj pri tiu branĉo. La **rikolto** ĝenerale estas tre kontraŭdira, ĝi oscilas inter ‘tre bona’ kaj ‘tre malbona’. Ankaŭ la kvanto malsamas, foje ĝi estas abunda kaj foje tre magra. La ĉefa kialo por tio eventuale estas manko de kriterioj kaj aldonaj klarigoj. Do **kio estas eseo?** Laŭ NPIV (p. 297) temas pri „verko, ĝenerale nelonga, ofte asimilita al esploro aŭ monografio, sed malpli sistema kaj pli libere esprimanta la pensojn de la aŭtoro“. La eseo troviĝas ie inter scienco, arto kaj ĵurnalismo, ligas ecojn de tiuj tri esprimvojoj. Enhave la eseo traktu temon, kiu baziĝas sur faktoj kaj sur



spertoj, kiujn la aŭtoro esprimas tra sia persona prismo. Kompreneble ĝi ne pezu pro iu scienca aparato kaj abundo da piednotoj. Gravas la **originaleco**, do teksto ne rajtas esti antaŭe aperinta aliloke. Indiko de kelkaj inspiraj fontoj ĉe la fino de la teksto estus konsilinda. La **temo** estu ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la koncerna UK, tio krome i.a. povas esti lingvaj problemoj, interkultura komunikado, Esperanto en teorio kaj praktiko (en historia, aktuala aŭ eventuala perspektivo).

Kompreneble la **lingvo** estu senriproĉa kaj sekvu la kutimajn normojn, kontrolitajn de la Akademio de Esperanto.

La **amplekso** povas varii inter 3 ĝis 8 paĝoj (kutimaj normpaĝoj kun ĉ. 45 linioj). Esceptoj eblas.

La **formo** tre gravas, malbone tajpita aŭ eĉ manskribita teksto ne estas akceptata de la ĵurio.

La ĵugantoj atendas puran, bone strukturitan tekston en formo de elektronika dosiero. Do, kiu kuraĝos konkursi por la sekva jaro?

Detlev Blanke
interkonsente kun
Gian Carlo Fighiera
kaj **Gotoo Hitoshi**

Atentigo: ĉiuj konkursaĵoj por ĉiuj branĉoj de la Belartaj Konkursoj 2009 devas esti senditaj al Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio (rete: michela.lipari@esperanto.org) ĝis la 31-a de marto 2009, inkluzive tiun por filmo.

Ralph Harry – persona omaĝo

Fariĝas sesdekjara la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj¹⁾. Mi volus kapti ĉi tiun okazon por esprimi personan omaĝon al la aŭstralia esperantisto-diplomato Ralph Harry (1917-2002) – eminentulo, kiu kapablis esti amika al iu kiel mi, jardekojn pli juna ol li kaj apartenanta al tute alia fono.

La fakton, ke Ralph grave kontribuis al la malnetverkado de tiu deklaracia teksto el 1948, prilumos por vi aliaj. Mi petas vian permeson prezenti miajn proprajn spertojn pri tiu al ĉiuj malfermita publika personeco, kaj mian komprenon pri lia metodo gajigi kaj amikigi la etoson ĉirkaŭ si.

Mia unua Universala Kongreso – en Rejkjaviko, 1977 – donis ĉefrolon al nia ligiteco kun la UN-sistemo. Tiujare la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Amadou-Mahtar M'Bow, ĉeestis kaj alparolis Universalan Kongreson de Esperanto. Ĝuste dum tiu historia kongreso mi persone konatiĝis kun Ralph Harry. Mi kompreneble konis la esperantigon de la UDHR – neniu serioza esperantisto tiutempe povus ne esti leginta ĝin – kaj mi atendis distancan, neatingeblan figuron. Sed min tuj frapis lia facilvente universala amikemo al ĉiuj. Li kapable esprimis tiun amikemon – sen plebismaj troigoj, sed sen elitismaj kompromisoj.

Tiucele li uzis ŝercemon bazitan parte sur vortludoj. Per gestoj kaj ironia tono li malkaŝe montris, ke li ne havas altan opinion pri la literatura nivelo de tiu humuro, sed simple ĝin uzas por establi amikan etoson.

Revenvoje el Islando, en la flughaveno Keflavík, konversacio inter Victor Sadler, Humphrey Tonkin kaj mi atingis la konkludon, ke de tiam mi reprezentu UEA en la novjorka sekretariato de UN. Humphrey tuj klarigis al mi, ke tio signifos intime kunagi kun la aŭstralia delegacio al UN, estrata de Ralph Harry. De septembro 1977 ĝis januaro 1979 mi agis tiurole sub la sentrude instrua kundirektado de Humphrey kaj de Ralph, kiu emeritiĝis ĉirkaŭ la fino de 1978. Ĉe nia adiaŭa tagmanĝo kun Ralph, li diris al ni, ke li intencas restadi ĉefe en Kanbero. Mi tial jam anticipis pli da kontakto kun li.

Ĉar ni jam sciis, ke la jaron 1979 mi pasigos en lia lando – ĉefe en Melburno (postenante kiel lingvisto en la tiea universitato), sed krome turisme en Sidnejo, Novkastelo kaj ankaŭ lia Kanbero. Dum tiu jaro mi plurfoje havis okazon vespermanĝi kun Ralph. Ĉe tiuj vespermanĝoj mi aŭdis de li postkulisajn klarigojn pri la metodo uzi la leĝeran

humuron por funkciigi amikan konversacian etoson sen troa trudado de specifaj opinioj. Li ankaŭ menciis iujn demandojn, pri kiuj grave ŝanĝiĝis la ĝenerala opinio inter lia junaĝo kaj la nuno. Mi memoras ĉefe lian punkton pri la rajto de patologie intelektodeficitaj homoj generi kaj varti infanojn – en sia junaĝo li akceptis la tiutempan preferon, ke ili prefere restu seninfanaj, kaj nun li lernis de posta generacio la nove vastiĝintan opinion, ke ili fakte rajtas varti infanojn kaj ke tio ne misefikas sur la kreskon de tiuj infanoj. Ralph emfazis, ke ni kutime ne havas sciancan bazon por forte apogi aŭ malapogi difinitajn proponojn, kaj ke tamen ni devas respondece agi surbaze de niaj plej klaraj komprenoj.



Mi vive memoras Esperanto-societan prelegon de Ralph, en kiu li reliefigis la gravecon por li de la tekstoj *Vivo de Zamenhof* (Privat) kaj *La danĝera lingvo* (Lins). Li estis prave – sed senorgojle – kontenta esti trovinta por siaj komentoj la nekutiman titolon 'Kial mi restas esperantisto', kiu sufiĉe devojiĝis de la troege ŝablona 'Kial mi estas esperantisto' por vekti kaj konservi la intereson de la societanoj, sed ne tiomege aspiris al beletraj pintoj, ke ĝi ĉesus funkcii kiel publika prelego. Ni ĝoju, ke Ralph tiel kapable kontribuis ne nur al la struktura agado por la homaj rajtoj, sed al la konkreta efektivigo de la rajto de la publiko havi ĉirkaŭ si bonan komunikan etoson,

en kiu floras la serioza sed senpompa diskutado cele al pli bonaj solvoj. Mi perfidos lian modelan ŝercemon, se mi perdos la okazon memori al la legantoj, ke mi, granda admiranto de lia modelo, estas malkapablega sekvento lia! Mi des pli fervore omaĝas al liaj atingoj en la aktiva strebado por pli justa mondo.

Probal Dasgupta

1) Rim. de la red.: La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis aprobita la 10-an de decembro 1948 fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi agnoskas la neforpreneblajn rajtojn de ĉiuj membroj de la homa familio. Ralph Harry estis membro de la aŭstralia delegitaro, kiu helpis krei la strukturon de UN tuj post la milito. Li kontribuis al la vortumado de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la ĉarto de UN kaj de la internacia mara juro. Laŭ iniciato de Ivo Lapenna, jam unu jaron antaŭ la Universala Deklaracio, UEA enkondukis en sian Statuton la principon, ke respekto de la homaj rajtoj estas esenca kondiĉo por ĝia laboro. La plena teksto de la rezolucio legeblas ĉe www.uea.org/dokumentoj/UN/homaj_rajtoj.html.

Institucio Hodler 40-jariĝis

La julia-aŭgusta numero de *Esperanto* en 1968 raportis pri plano de la Estraro de UEA lanĉi kampanjon por „fortikigi la financon bazon de la Asocio“. La artikolo emfazis: „Ne ekzistas en la mondo kulturaj organizaĵoj, laborantaj sen iu ajn subvencio, kiuj povas funkcii sen deficitaj nur per siaj membrokotoj. Iliaj manoj estas ligitaj pro konstanta monmanko. Prosperas nur tiuj, kiuj trovis aliajn fontojn de enspezoj.“

La kampanjo celis kolekti kapitalon, kies rento liveru al UEA ekstrajn rimedojn aldone al kotoj. Rezulte, la 28-an de oktobro estis starigita fondaĵo, kies oficiala nomo fariĝis Institucio Hodler '68. Ĝi ricevis propran juran personecon en Nederlando, kun estraro nomumata de la Estraro de UEA. Ekde la komenco ĝi kolektis donacojn kaj pruntojn sen rento aŭ kun malalta rento. La unua estraro konsistis el E.L.M. Wensing (prezidanto), Maurice Jaumotte kaj Evert J. Woessink, kiuj membriis ankaŭ en la Estraro de UEA. Marianne Vermaas, kiu

samjare rezignis kiel Direktoro de la Centra Oficejo, fariĝis la unua administranto.

La nuna prezidanto de la Institucio estas Grégoire Maertens, kiu eniris la estraron unuafoje en 1970 kaj estas prezidanto ekde 1986. En la estraro membras krome Ans Bakker-ten Hagen, Renato Corsetti, Ivo Durwael kaj Ilja De Coster, kaj la administranto estas Pasquale Zapelli. La ĉefa havaĵo de Institucio Hodler estas domo en Antverpeno, kiu estis akirita en 1980 kaj kiun luas Flandra Esperanto-Ligo kaj la Antverpena Esperanto-klubo „La Verda Stelo“. Ĉi-jare la Institucio aljuĝis



Hector Hodler (1887-1920)

subvenciojn je la suma valoro de 9 200 eŭroj. La plej grandan subtenon, 5 000 eŭrojn, ricevis Fondaĵo Canuto. Projektoj ekster UEA ricevis 1 700 eŭrojn.

Kiu deziras prunti aŭ donaci monon al Institucio Hodler, bv. kontakti la Centran Oficejon por pli detalaj informoj. (GaKo)

La solvon bonvolu sendi al la redakcio ĝis la fino de marto 2009. Unu el la solvintoj (decidos loto) ricevos la libron *107 krucenigmoj en Esperanto* de Stano Marček.


Krucenigma konkurso


HORIZONTALA: A – Plirapidigas – restu sur la piedoj. B – Infanece kredema – terloĝant'. C – Infloreska flor' – eligadu flareblajn korperojn. Ĉ – Aŭtosimboloj de Francio kaj Panamo – ne transpasanta limojn – brusta elstaraj'. D – Kreskaĵ', el kiu oni produktas tolon – frakcioj – alta ludkarto. E – Aŭdorgana – monkestan. F – Fiŝkaptistan grandmaŝan teksaĵon – fortege dezirante. G – Rilata al honora respekto – aparat' por malkovri malproksimajn aviadilojn aŭ ŝipojn. Ĝ – Falas neĝo – grupiĝo, kolektiĝo. H – Spirita atmosfero – opon de ses personoj. Ĥ – Ekzistis – kun amika inklino. I – Ĉiela astro – libroforme. J – Rilataj al trinkvazo – aliulaj, posedataj de iu alia (evi). Ĵ – Alpaŝo – suprentirata (pri flago, sen finaĵo). K – Muzikaĵoj ludataj de unu artisto – rilata al Atoso. L – Kaj tiel plu – sentis fortan korinklinon – numeralo. M – Denova, refoja – patrino (en multaj nacilingvoj) – angla virnomo. N – Fabelaj gigantoj – reĝo de la Hunoj. O – Vortero en substancnomoj (nitrogenhava grupo NO₂) – trafon, jeton de pilko en celon. P – Grasaj likvaĵoj – Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko.

VERTIKALA: 1 – Unua parto de la kaŝita proverbo. 2 – Serpentmaniere moviĝi – denova met' – loĝejo por brutoj – kovril'. 3 – Havantan dorsan elstarajon – la tuto de samnivelaĵoj en domo, tavolo – nom' de artefarita teksaĵfibro – ne tute, ne plene. 4 – Nukso de avelujo – daŭre restadas, okupas loĝejon – instrumentaro – romia dio de amo. 5 – Eleganta ĉambr' por gastoj – korta birdo – aromaj likvaĵoj, uzataj kiel saŭco aŭ spicaĵo – monatoj. 6 – Varkvanto, estanta dispone – estas ŝategata – rilata al la dio en Korano – prezento al vi en la spirito. 7 – Ĝenaj ĉar tro longaj kaj malinteresaj – monavide – granda batal' per armiloj – ne sentos malsaton. 8 – Rilata al delikataodoro – estis sur seĝo – cikonioforma birdo – karakteriza maniero. 9 – Valoras pro malofteco – malrapide ludata muzikpeco – verkas – dion de la ventoj. 10 – Dua parto de la kaŝita proverbo.

Helpo: Umbel, Ibiso, Tesil, Eolon.

El la libro *107 krucenigmoj en Esperanto* de Stano Marček





Trezorego de nia literaturo

Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto. Geoffrey Sutton.
New York: Mondial, 2008. 728 p. 24 cm.
ISBN 9781595690906. Prezo: € 45

Ege impona libro publikigis julie 2008 – anglalingva enciklopedio de la originala literaturo en Esperanto dum la unuaj 120 jaroj de nia lingvo. Ankaŭ bele eldonita – plia bona laboro de Mondial.

En sia antaŭparolo Humphrey Tonkin faras trafan demandon, kiun verŝajne multaj ne-esperantistoj farus: kiel tiel-nomata konstruita lingvo entute povus havi literaturon? Nestudintoj foje estas tiom konvinkitaj pri la neeblo de tia literaturo ke ili eĉ ne sentas bezonon kontroli – ili simple „scias“ ke tio ne eblas! Kiel nia forpasinta amiko, Claude Piron, dirus france *l'ignorance ignorée* (nekonscia nescio). Sed eĉ la plej obstina nescianto havus problemojn nei la ekziston de nia literaturo post la apero de ĉi tiu interesea libro, kaj pro tio Geoffrey Sutton meritas niajn gratulon kaj elkoran dankon.

Fakte temas pri librego: sur 728 paĝoj la aŭtoro sisteme pritraktas jarcenton kaj kvinonon de la unua vere monda literaturo. Ni citu el la dulingva rekomendo de la prezidanto de EVA/Esperantlingva Verkista Asocio, Mauro Nervi:

La literatura memoro estas la kerno de kulturo ... Ĉi-tiu monumenta verko estas ne nur literatura historio, sed pli ĝenerala prezento de nia literatura kulturo, inkluzive de nia kritikarto. ... Geoffrey Sutton ... kreis la ĝis nun plej kompletan kaj konvinkan prezenton de la Esperanta literaturo ĝenerale. Esperanto ... estis literatura lingvo ekde sia plej frua komenco.

PEN International fine agnoskis Esperanton kiel literaturan lingvon en 1993, post pli ol jarcento de literatura verkado, sed ni ĉiuj konas ne-esperantistojn, eĉ klerajn, kiuj ial ankoraŭ ne rimarkis tion. Nun ni havas konkretan kaj imponan libron, en la angla lingvo, por montri al la dubantoj. Laŭ mia sperto dum ekspozicio en la Eŭropa Parlamento la 14-an de julio 2008, montri tiun libron ja efikas, kaj aldone konvinkas la akademiaj atingoj de Geoffrey Sutton en la sveda, la finn-ugraj kaj aliaj lingvoj.

La verko komenciĝas per utila enkonduko por anglalingvanoj kiuj ne konas Esperanton, do estos espereble la granda plimulto de ties legantoj. Ĝi tuj alfrontas unu el la plej enradikiĝintaj antaŭjuĝoj, la tre disvastiĝintan miskomprenon pri la tiel-nomata „artefariteco“ de Esperanto. Sutton citas Janton (p. 5): *La koncepto*


‘artefarita lingvo’ ne havas sencon, nek en scienco nek en arto. La lingvistiko preferas la terminon ‘planlingvo’. Tro ofte Esperantistoj akceptas tiun sensencan terminon, aŭ eĉ mem uzas ĝin. Prave André Cherpillod atentigas pri tiu eraro en sia lastatempa verko pri vera artefarita lingvo, Solresol (*Dore Doremilado Solresol*). La enkonduko plue priskribas la literaturan evoluon de Esperanto, la demandon kial verkistoj entute elektas verki Esperante, la skolojn kaj ĝenrojn, la agnoskon fare de la ekstera mondo kaj la estontecon. Tre utilas (p. 18) la tratempla listo de la 46 plej gravaj verkistoj por enkonduki novulon en nian literaturon. Kvankam malfacilas trovi du literaturkritikistojn kiuj konsentus pri la tuta listo, almenaŭ pri la verkistoj kiuj ne eniris ĝin, ĝi ŝajnas enhavi ĉiujn ‘grandulojn’, de Zamenhof, Privat, Miĥalski, Kalocsay kaj Baghy, tra Auld, Mattos, Boulton, Goodheir, Ragnarsson, Urbanova, ĝis Ŝtimec, Camacho, Steele, Ungar, Neves, Montagut ktp. Sed kial ne Grabowski?

La enciklopedio dividas la literaturon de Esperanto en kvin periodojn, kaj donas koncizan enkondukon al ĉiu periodo:

- 1) 1887-1920: Primitiva Romantikismo kaj la Starigo de Stilo.
- 2) 1921-30: Matura Romantikismo kaj Literatura Florado.
- 3) 1931-51: Parnasismo kaj Matureco.
- 4) 1952-74: Post-Parnasismo kaj Modernismo.
- 5) 1975 – : Popularigo de la Romano, Eksperimenta Poezio, Postmodernismo.

La priskriboj fariĝas pli longaj kaj ampleksaj laŭ la evoluo de la literaturo mem – de 52 paĝoj por la unua periodo ĝis 174 paĝoj por la kvina. Ne eblas en mallonga recenzo eĉ listigi la trezorojn de tia verko, sed ĝenerale ĝi estas praktika kaj bone organizita verko. Sutton prave substrekas la konvinkon de Zamenhof pri la graveco de literaturo por nova lingvo. Ne ĉiuj lingvoiniciatantoj, aŭ pli precize lingvoiniciatuntoj, konsentis kun li pri tio, kaj tio eble iom klarigas kial venkis Esperanto! Aparte menciindas (p. 403) ke Esperanto bezonis 70 jarojn por produkti la unuajn 50 romanojn, sed nur 14 por la duaj 50!

Du aliaj aferoj interese multajn: la kvanto da paĝoj kiuj traktas diversajn aŭtorojn, kaj la kvanto da aŭtoroj en Esperanto kies verkoj estas publikigitaj en naciaj lingvoj. Mi menciui nur kelkajn de la pli konataj aŭtoroj kaj ties kvanto da paĝoj en la verko: Auld 15, Kalocsay 13, Baghy 10, Boulton 10, Ragnarsson 10, Camacho 7, Steele 6, Nemere 6, Ŝtimec 5, Zamenhof 5. Menciindas ankaŭ Sara Larbar, la unua denaskulo kiu verkis romanon (*Karuseloj*, 1987); kaj



Valdemar Langlet, kunlaboranto de Raoul Wallenburg en la dum milita Budapeŝto, kiu havis la ideon disdoni la svedajn ambasadaĵajn leterojn (*skydds brev*) kiuj savis la vivon de 10 mil judoj. Kiomas niaj aŭtoroj kies verkoj estas tradukitaj kaj publikigitaj nacilingve? Nun facilas respondi: hungare 49, angle 46, itale 30, ukraine 28, pole 26, france 20, japane 20, rumane 20, nederlande 19, kroate 18, vjetname 17, germane 14, portugale 14, ruse 13, ĉine 12, ĉeĥe 10, finne 9, hispane 8, islande 8, skotgale 8, svede 8, litove 5, kaj estas multaj lingvoj kun malpli ol 5.

Ekzemple, estas pli ol kvar paĝoj pri Albert Goodheir, la tradukanto de la plej bela poemo en la irlanda lingvo, *La Noktmeza Kortumo*, kiun mencias Sutton sur paĝo 398.

Eraroj? Ege malmulte. Ni menciis nur unu: 'Mc', kiu uziĝas en Irlando por anglalingvaj sed ne por irlandlingvaj familiaj

nomoj, devus esti „Mac“ en la irlandaj nomoj 'MacGiolla Gunna' kaj 'MacGiolla Meidhre' (p 398).

Estas enhavriĉa sekcio pri la lingva strukturo kaj kreivaj kapabloj de Esperanto, kiu entenas specimenaĵajn literaturajn tekstojn, vortaron por la tekstoj; estas ampleksa etskribita 68-paĝa bibliografio; sekcio pri la kulturo de Esperanto, kiu citas duonpaĝon de la tre interesa hispanlingva libro de Antonio Valén, *El esperanto: lengua y cultura* (2004); informoj pri interlingvistiko, biblioteko, retejoj, Esperanto en radio; kaj fine pli ol 50-paĝa indekso, kiu faciligas serĉadon.

Resume: nemalhavebla verko por ĉiu, kiu celas ekkoni nian originalan literaturon, aŭ eĉ efike antaŭenigi Esperanton.

Seán Ó Riain

Li ne pigras sur siaj laŭroj

La lingvo serena. Plena originala verkaro.

Baldur Ragnarsson. Pisa: Edistudio, 2007.

799p. 18cm. ISBN 9788870360783. Prezo:

€ 27,00

Sur la skribotablo de la recenzanto kuŝas volumo ne nur dika, sed ankaŭ tre riĉa, bunta kaj ampleksa. En ĝi defilas ne malpli ol 108 poemoj kaj 66 plurĝenraj kaj malsamlongaj prozaj tekstoj de la konata kaj elstara islanda poeto, literaturkritikisto, eseisto kaj tradukisto Baldur Ragnarsson (n. 1930), krom uverturo de 7 diversaŭtoraj eseoj pri lia poezio.


Marjorie Boulton (*Etaj pensoj antaŭ ega kolekto*), Jorge Camacho (*Baldur Ragnarsson, duklingva poeziisto*) kaj Edwin de Kock (*Baldur Ragnarsson kaj mi*) elmetas ĉefe personajn rememorojn pri konatiĝo kun la aŭtoro kaj senpretende ŝparvortajn (tamen interesajn) pripensojn pri la ĉefaj facetoj de lia talento. Same mallonge sed tre dense Probal Daŝgupto (*Proceza poeto*) liveras originalan, profundan kaj fruktodone cerbostreĉan analizon pri kelkaj poemoj el la kolekto. En pli longa (19-paĝa) eseo (*La poezio de Baldur Ragnarsson: tradiciismo renkontas modernismon*) Humphrey Tonkin trafe lokas la aŭtoron en la historia fluo de la Esperanta poezio, skizas liajn ĉefajn literaturajn influojn, kaj verdajn kaj etnajn, kaj ligas lian poemadon al lia propra literatura teoriumado, renkontebla en la dua parto de la nuna volumo. La simillongan (16-paĝan), erudician kaj konvinkan eseon de Nicola Ruggiero (*La ĉerizarboj de Baldur Ragnarsson*) okupas nur unu ĉefideo: la influo (ĉu evidenta, ĉu kaŝa) de la greka poeto Konstantinos Kavafis sur la produktadon de nia islanda bardo. Ĉi unuan parton inde epilogas 28-paĝa eseo de Mauro Nervi (*Laŭ dezerto retorika: Baldur Ragnarsson kaj la etiko de silento*), legebla ankaŭ rete¹. Ĝi pintas ĉi-parte, ne tiom pro sia longeco, sed ĉefe tial, ke ĝi fake, gvide kaj detale (tamen sen vanaj digresioj) traarkas la

tutan poezian itineron de nia serena eminentulo. La suprajn eseojn (precipe la lastajn kvar) mi rekomendas legi almenaŭ dufoje: antaŭ kaj post tralego de la tuj sekvaj poemaroj. Tion mi faris kun granda profito.

La duan parton malfermas la du konataj poemaroj *Ŝtupoj sen nomo* kaj *Esploroj*, eldonitaj de Régulo Pérez ĉe Stafeto, respektive en 1959 kaj 1973, kaj fermas fasketo de 16 *Aldonaj poemoj*, verkitaj inter 1955 kaj 2007 kaj distie publikigitaj aŭ unuafoje aperantaj. Nervi informas, ke la du poemaroj prezentiĝas *en formo reviziita ekskluzive por ĉi tiu eldono*. Kvankam la ŝanĝoj estas nek multaj nek gravaj, tamen komparo inter la Stafeta kaj la Edistudia eldonoj montras konstantan zorgon precizigi la tropojn kaj poluri la lingvaĵon:

[plen' > fort'] kaj *virto*, *larĝegaj stratoj* > *stratoj sen difino*, *vojon* [fari > plani], *vako* [ankoraŭa > finomanka], *molliniaj* > *mole konturaj*, *kun multa scienco* > *ja tre erudicie*, [ridetis > grimacis] *triste*, [ŝvelantan > veluran] *molon*, *sunaj sagoj tiklis miajn* [plandojn > vangojn]. Aliiĝas ankaŭ la titoloj de apartaj poemoj: *La magoj* > *La optimistoj*, *Akvoj* > *Speguloj*, *Vi skribis pri la vitroj* > *Vitroj*. En la unua alititola poemo la aŭtoro proponas ankaŭ, inter pluraj etaj plibonigoj, kuriozan pronoman modifon [ni > ili], kiu ŝanĝas la tonon de la mesaĝo kaj eble signas subkonscian distanciĝon disde la

kristana tradicio. En alia poemo metamorfoziĝas eĉ tuta mitologia figuro, bedaŭrinde kun mistajpo: *de Sizifo* > *de la riverdio Sefizo* (anstataŭ la ĝusta *Cefizo*). En *Ŝtupoj sen nomo*, kelkaj poemoj el la Tria Ŝtupo (12a, 13a, 14a, 16a, 17a) draste transformiĝas enhance, kvankam ne metrike. Samverke kaj samŝtupe, la poemo 19-a liveras la finan version, kiu mankas ĉe Stafeto (verŝajne pro komposta koboldo) kaj la 21-a prezentas plibonigon en la 5-a strofo kaj ege pli bonan redakton de la lastaj tri strofoj. Interesajn modifojn ricevas ankaŭ la prologo de *Esploroj*. Maturiĝo alportas bezonon pluraligi, nuanci kaj mildigi: *Por mi poezio estas esploro*; kaj



maniero kapti [disfluantan penson > disfluantajn pensojn kaj impresojn] por [ĝin > ilin] fiksi en spaco kaj tempo; La sentoj estas [la miaj; > miaj,] [neniel aliaj personoj > aliaj personoj apenaŭ] povas ilin sperti absolute same; mi ja deziras doni, ne nur elmeti mian memon sur publikan tablon por profana dissekado > mi deziras laŭeble partoprenigi aliajn en miaj spertoj, sentoj kaj pensoj.

La poezio de Ragnarsson estas intelekta postula. Oni ne serĉu en ĝi lindajn madrigalojn aŭ pepajn najtingalojn. Kvankam serena, lia liro abomenas serenadojn. Ĉio ĝermas, disvolviĝas kaj vortumiĝas ene de lia fekunda kaj kribrema menso. Ankaŭ eksteraj pejzaĝoj tien transŝoviĝas kaj tie trovas sian ekzistokialon. Ĝi elfiltras frapan aŭ subtilan gangon (eĉ kiam ĉi lasta fontas el kulturaj aŭ metriaj konvencioj) kaj liveras rafinitan, puran, iasence perfektan poezion. Al liaj poemoj eblas kaj indas reveni ofte. Oni trovas ilin ĉiam novaj, defiaj kaj stimulaĵoj. La sama leganto en malsamaj okazoj eble malsame interpretos liajn bildojn kaj figurojn. Tio venas ne de eventuala komplikeco aŭ hermetikeco de lia poezio, sed de trajto, kiu diferencigas poeton eternan disde poeto nur efemera aŭ laŭmoda: la kapablo naski mensan malkvieton.

La trian parton ĉi-voluman konsistigas eseoj, artikoloj, prelegoj, recenzoj, prefacoj kaj postparoloj, dediĉitaj al tri ĉefaj temoj, al kiuj respondas sama nombro da ĉapitroj: Esperanta literaturo originala kaj tradukita (216 p.); literatura teorio (141 p.); islandaj lingvo kaj literaturo (96 p.). Pri ĉiuj ĉi temoj Ragnarsson montras sin fidinda fakulo. Tamen li ne kirasas sin per apenaŭ penetrebla jargono, bedaŭrinde ofta ĉe fakuloj. Lia stilo fluas, kaj ĉiam klaras lia maniero aliri, elmeti kaj eksplicite ŝajne komplikajn aferojn. Elstaran lokon, ne nur ĉi-parte, sed en la tuta kolekto, okupas lia 64-paĝa *La poezia arto*, aro de kvin prelegoj faritaj kadre de la 26-a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo en 1986 kaj libroforme eldonitaj de Artur E. Iltis (t.e. de Reinhard Haupenthal) en 1988. Jen nepre legaĵo por iu ajn serioza amanto aŭ studanto de la Esperanta poezio. Fine de la kvina prelego la aŭtoro atentigas, ke *la temo estas vasta kaj malfacile traktebla kaj ke ĝi eventuale impresis vin kiel komplika, eble tro komplika en mia prezento*. Tamen lia timo estas tute senbaza: post lego kaj relego de lia eskvizita pritrakto, ĉio ŝajnas ege klara kaj travidebla. Poeto kaj eseisto osmoze kunekzistas en la sama persono. Ili nutras kaj influas sin reciproke. Tio estas eble la ĉefa ŝlosilo de la unikeco de Ragnarsson kiel Esperanta verkisto.

La libro plaĉas ankaŭ kiel fizika produkto. Ĝi estas kompetente redaktita kaj bele eldonita. Ĝin ŝirmas glacea jaketo kun plenpaĝa kolora portreto de la aŭtoro. La unua jaketa faldoklapo cite resumas la sintenon de Ragnarsson pri la lingvo kaj ankaŭ pravigas la titolon de la kolekto: *ĝia fonetika skribmaniero, ĝia vortofara travidebleco, ĝia celado al alta idealo, similas al serena ĉielo*. [...] *Tian senton pri Esperanto kiel lingvo serena mi transportis tute senbare kaj nature en ĝian literaturan mondon*.

Feliĉe la subtitolo *plena originala verkaro* ne plu estas aktuala. Nur kelkajn monatojn post la nuna eldono, aperis ĉe Mondial *La neceso akceptebla*, 116-paĝa volumo, kiu enhavas la *plej novajn originalajn poemojn de la islanda*

verkisto, kreitajn en 2007 kaj 2008. Krome, sameldoneje kaj preskaŭ samtempe eliris du pliaj dikaj elislandaj tradukoj de Ragnarsson. Sojle de 80-jariĝo, nia serena poeto videble ne pigras sur siaj laŭroj nek formetas sian plumon.

Laste mi menciuj, ke en la nuna kolekto mankas la poemo *Post tiom da jaroj*, aperinta en la festlibro *Speciale por Henri Vatré* (p. 58), eldonita de Artur E. Iltis en 1988. Interkonsente kun la aŭtoro, mi plene citu ĝin recenzoŝlose, por iel ripari la mankon:

*Post tiom da jaroj verki trasenteme
ne plu senciĝas, ĉeas la realo
komplika tro, kaj kontraŭ lasta falo
nenio nin protektas.*

Tamen ĝeme

*ni ne esprimu nin, dum tiuj ondoj
plu nin subportas, kies vastaj krestoj
neniel cedas pri siaj brilogejoj
sub ĉiel' ŝanĝiĝanta.*

Vagabondoj

*ni kredas nin, sed tamen niaj ŝipoj
gvideblas minimume, ilin pelas
ventoj kaj kurentoj, kaj nenion celas
homdeciditan, forestas la precipoj.
La rando nin atendas, ne haveno,
falo duobla: de ŝipoj kaj kurteno.*

Gonçalo Neves

Avo Frosto respondos en Esperanto!

Kristnasko 2008 alvenas kaj centmiloj da infanoj el la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Ekde 2002 la infanoj kiuj skribas Esperante, ricevas la respondon en Esperanto.



Ni invitas esperantistojn, junajn kaj junkorajn, malkovri tiun kristnaskan tradicion kaj skribi al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al:

AVO FROSTO, NORDA POLUSO,
KANADO – CANADA, HOH OHO

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu klare skribi vian nomon kaj adreson por certigi ricevon de respondo.

Krome, indiku klare ke la letero estas en Esperanto ĉar la helpantaj koboldoj ne ĉiam rekonas pri kiu lingvo temas.

Normand Fleury

koboldo por la Kanada Poŝta servo



100 jaroj
universala
esperanto-
asocio

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Aziaj kontribuoj al esperantologio. Aktoj de la 30-a Esperantologia Konferenco en la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, Jokohamo 2007. Gotoo, Ma, Yamasaki, Tida, Huĝimoto, Sibayama, Usui, Sakaguchi. Red. Ulrich Lins. Rotterdam: UEA, 2008. 61p. 30cm. ISBN 9789290171072. Tekstoj de ok prelegoj. € 9,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

Beletra Almanako 3. (Septembro 2008). Red. J. Camacho, P. Daŝgupto, I. Ertl. Novjorko: Mondial, 2008. 175p. 22cm. ISBN/ISSN 9781595691071/19373325. Ilus. Prozo originala, poezio originala kaj tradukita, eseoj, recenzoj, Belartaj Konkursoj. € 9,90

Devoj kaj agoj / Sollen und Handeln. Helmut Angstl. Göttingen: Leins, 2000. 16p. 21cm. ISBN/ISSN

3932975308/16157370. Dulingva (E, germana). Teksto de prelego pri moralo, prezentita en Rimini en 1999. € 3,00

Donacetoj por infanoj. Ludmila Jevsejeva. Riga, 1994. 4x16p. 15cm. Kvar libretoj kun originalaj poeziaĵoj. € 4,50

Elektitaj metodoj de komputil-programado. Reinhard Fössmeier. Göttingen: Leins, 2000. 20p. 21cm. ISBN 3932975316/16157370. Teksto de prelego prezentita en Rimini en 1996. € 3,60

Enkonduko al distribucio. Christer Kiselman. Göttingen: Leins, 2004. 28p. 21cm. ISBN/ISSN 3932975197/16157370. Teksto de kurso prezentita en Brandýs nad Labem en 1992. € 6,00

Flavius Josephus — vero kaj mito pri paco kaj milito. Věra Barandovská-Frank. Göttingen: Leins,

2004. 27p. 21cm. ISBN 3932975170/16157370. Eseo ĉirkaŭ la verko *De bello Iudaico* (Juda milito). Teksto de kurso prezentita en Tel Aviv en 2000. € 5,70

Interlingvistiko — Planlingvoj kaj iliaj ecoj / Interlinguistik — Plansprachen und ihre Eigenschaften. Werner Bormann. Göttingen: Leins, 2004. 40p. 21cm. ISBN/ISSN 3932975162/16157370. Dulingva (E, germana). Prezento de diversaj tipoj de planlingvoj. Teksto de kurso prezentita en Rimini en 1995. € 6,30

Itala socialismo kaj Esperanto, La. Div. El la itala trad. div. Paris: SAT, 2008. 74p. 16cm. ISBN 9782952892216. Tekstoj de debato pri Esperanto aperintaj en italaj socialismaj gazetoj en 1918. € 5,10




Lingvo Internacia. („Unua Libro“). D-ro Esperanto.

El la rusa trad. A. Kerbel. Hajfo: La tradukinto, 2008. 37p. 21cm. Elrusigo de la „Unua Libro“. € 4,80

Pariza Komunumo de 1871, La. Div. El la franca trad. div. Paris: SAT. 90p. 16cm. ISBN 9782952892223. Ilus. Konkiza prezento de, eble, la plej grava politika evento de 1871. € 5,10

Pri la kulturhistorio de Eŭropo / Zur Kulturgeschichte Europas. Wolfgang Viereck. Göttingen: Leins, 2000. 52p. 21cm. ISBN/ISSN 3932975324/16157370. Dulingva (E, germana). „Kontribuao al la Eŭropa Jaro de la Lingvoj 2001“ prezentita en Hradec Králové en 2000. € 7,20

Pro kio? Argus (Friedrich Ellersiek). Novjorko: Mondial, 2008 (2-a korektita eld.). 155p. 21cm. ISBN 9781595691101. Drameca teksto, interesa el kultura, historia kaj



psikologia vidpunktoj, ne ĉiam intencitaj de la aŭtoro. € 12,00

Sigmund Freud kaj la naskiĝo de la psikanalizo.

Carlo Minnaja.
Göttingen: Leins, 2000.
60p. 21cm. ISBN/ISSN
3932975332/16157370.
Prilaborita teksto de prelego
prezentita en Rimini en
1999. € 7,20

Torkvato Tasso. Goethe. El
la germana trad. W. Nüesch.
Berno: La tradukinto, 2008.
113p. 21cm. Dramo pri
la mezepoka itala poeto
Torquato Tasso. € 9,00

NELIBROJ

Bildkartaro. Alise Mediņa.
Radieto, 2008. Komplet
de 12 bildkartoj kun
reproduktaĵoj laŭ artaĵoj
de juna latva pentristino.
Klarigoj en la latva kaj
Esperanto. € 3,60

Fabeloj de Andersen.

Voĉlegas Stano Marček.
En Esperanton trad. L.L.
Zamenhof. Martin: Stano
Marček, 2008. 8 diskoj. Pli
ol sep horoj da popularaj
rakontoj. KD. € 79,50



Fabeloj de la fratoj Grimm.

Voĉlegas Stano Marček.
En Esperanton trad. Kabe.
Martin: Stano Marček,
2008. 8 diskoj. Preskaŭ 8
horoj da popularaj rakontoj.
KD. € 79,50

Flago Esperanta kun

bastoneto. 26x39cm. El
kvazaŭsilka materialo, kun
52-centimetra bastoneto.
€ 4,20

Glumarko „Esperanto

— Internacia Lingvo“.
Paris: SAT. 4,5x7,5cm.
La Esperanta flago kun la
vortoj „Esperanto Internacia
Lingvo“. € 0,30

Lingvo Internacia. („Unua

Libro“). D-ro Esperanto.
El la rusa trad. A. Kerbel.
Hajfo: La tradukinto, 2008.
Elrusigo de la „Unua Libro“,
en formato PDF por PC kaj
Mac. Komputila KD. € 3,90

Pluvombrelo. Malgranda,
malhelblua, kun la vorto
ESPERANTO kaj la jubilea
simbolo de UEA. € 6,00


Springboard to Languages.

[2008]. Kiel funkcias la
fama brita projekto en baza
lernejo en Lancashire?
Komputila KD. € 3,30

Springboard to Languages

— **Games.** Barlaston: EAB,
2008. Facilaj komputilaj
lingvaj ludoj por infanoj
lernantaj Esperanton.
Uzinstrukcioj en la angla!
Komputila KD. € 3,00

OSIEK-PREMIO 2008



En 2008 la Osiek-anoj proponis 21 verkojn premiindajn; ĉiuj
estis prezentitaj en la julia numero de *La Gazeto*. La 17-an
de julio 2008, dum la IEK en Sempeter, Slovenio, sekreta
voĉdonado atribuis la premion al

Sergio POKROVSKIJ

pro

‘Komputika leksikono’

Gratuloni!

La premio, 600 €, rekomencas vivantan alitoron pro
publikigita verko ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro.
Informoj: *La Gazeto*, 12 sous la Ville, FR-55210 Creully <http://osiek.org>

La libro, eldonita de Sezonoj en 1995, estas elĉerpita, sed ĝia ĝisdata reta versio troviĝas je:
http://bertilow.com/div/komputada_leksikono/DEFAULT.html

Oficiala informilo

DUMVIVAJ MEMBROJ

Japanio: F. Okada.

Nederlando: D. Kampmann.

Svislando: T. Carlevaro.

Usono: M. Kennedy.

PATRONOJ DE TEJO

Germanio: B.-A. Wickström.

Italio: G. Zanoli.

SOCIETO ZAMENHOF

Brazilo: P.A. Cardoso.

DONACOJ

Ĝis la 15-a de novembro 2008

Kapitalo Afriko:

Nederlando: A. & H. Bakker:

1000,00.

Sumo ĉi-jara: 1500,00.

Konto Afriko: Nederlando:

C. & R. Bossong 50,00; S.

P. Smits 100,00. Svedio:

J. Hammarberg 10,02.

Svislando: L. Ortelli 20,00.

Sumo ĉi-jara: 1563,45.

Fondaĵo Ameriko:

Finnlando: T. Sormunen

50,00. Usono: A.

Victor 100,00. Svedio:

J. Hammarberg 20,02.

Svislando: L. Ortelli 20,00.

Sumo ĉi-jara: 2059,86.

Fondaĵo Azio: Japanio: M.

Itabasi 43,16; Y. Yamamoto

17,26. *Sumo ĉi-jara: 1953,29.*

Fondaĵo Canuto: Francio: L.

Marin 80,00. Luksemburgio:

B. Moon 50,00. Nederlando:

A. & B. Bakker 1000,00; R.

Moerbeek 50,00.

Sumo ĉi-jara: 5705,46.

Fondaĵo Espero:

Nederlando: C. & R. Bossong

100,00. *Sumo ĉi-jara: 1140,84.*

Fondaĵo Junularo: Francio:

T. Depecker 50,00. Pollando:

Anonima 10,00.

Sumo ĉi-jara: 294,33.

Volontula Fondaĵo: Aŭkcio

dum la 93-a UK: 2547,55.

Sumo ĉi-jara: 3779,66.

Domrenovigo: Nederlando:

A. & H. Bakker 1000,00 +

(biblioteko) 1000,00.

Sumo ĉi-jara: 4040,00.

Ĝenerala kaso: Belgio: F.

Witdoeck 40,80. Francio: R.

Triolle 174,80. Nederlando:

Anonimaj 185,00.

Sumo ĉi-jara: 1872,40.

Al ĉiuj koran dankon! UEA

Anoncetoj

Unu vorto = 1 €. Ni ne respondecas pri la enhavo.
Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondpetoj zorgas
ankaŭ Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000
Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.

PARDONPETO: Mi pardonpetas al Nataŝa, la kantistino
de la duopo „Ĵomart kaj Nataŝa“, pro tio, ke mi, malgraŭ ŝia
skriba malpermeso, publikigis ŝian foton sur la kovrila paĝo
de la revuo *Freŝo* n-ro 22. Mi vere bedaŭras tiun incidenton
kaj eventualajn malavantaĝojn aŭ malbonajn reklamojn,
kiujn mia publikado povus kaŭzi al ŝi (aŭ al la duopo).

Marian Zdankowski

Redaktoro de la revuo *Freŝo*



◆ **UKRAINIO:** La 11-an de oktobro, 2008 okazis en Odeso jam la 4-a lingva festivalo *Ĉielarko de lingvoj*, dediĉita al la Jaro de Lingvoj 2008, Tago de Lingvoj – la 26-a de septembro, kaj Ago-Tago – la unua sabato de oktobro. Organizis kaj gvidis ĝin la Odesa junulara Esperanto-klubo „Verdaĵo“. Ĉi-jare ĝin partoprenis kelkcent personoj, kiuj aŭskultis prezentadojn de la lingvoj: azerbajĝana, araba, bjelorusa, bulgara, ĉina, Esperanto, germana, greka, hindia, itala, korea, kurda, latina, malaja, persa, pola, rusa, vjetnama.

Tatjana Auderskaja

◆ **BOSNIO-HERCEGOVINO:** Komence de septembro la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino okazigis provan Sanmarinecan Universitatan Sesion (SUS) en Banjaluko, Bosnio kaj Hercegovino. Partoprenis dudeko da anoj el 8 landoj, kun subteno de la loka universitato kaj sub la lerta organizado de la loka AIS-profesoro Ljubiša Preradović. La malfermon en la festa salono de la banjaluka Akademio de la Artoj, en la rektoreja domo de la universitato, gvidis OProf. Hans Dietrich Quednau, senatano de AIS. La sesion persone salutis kaj bonvenigis Predrag Gluhaković, bosnia-hercegovina ministro. En la stud-programo okazis kvar kursoj de po ok lecionoj, pri jenaj temoj: *Geografia informprilaborado* (OProf. Quednau), *Teknikoj kaj metodoj de mensa laboro kaj ergonomiaj mezuroj de fizikaj kaj de psikaj*

pen-elspezoj (EProf. Lewanderska-Quednau), *Informadika modelado* (EProf. Preradović), kaj *Bazaj principoj de la religia turismo* (EProf. Leonov). Fine de la sesio du kandidatoj defendis en publikaj ekzamenoj la rezultojn de sia studado: Sukcese bakalaŭriĝis Małgorzata J. Komarnicka kaj doktoriĝis Friedrich Josef Dörr, en la sekcioj morfo-sciencia kaj hom-sciencia de AIS. La Ĝenerala Asembleo de AIS planas en 2009 okazigi SUS-on en Bjalistoko, parte dum kaj post la 94-a Universala Kongreso de Esperanto.

◆ **AŬSTRIO:** La 1-an de decembro 2008 aperis la aŭstria poŝtmarko „esperanto.net“ okaze de la jubileo „100 jaroj de Universala Esperanto-Asocio“. Unuekzemplero estas senkoste havebla ĉe: esperanto@chello.at.

Walter Klag



◆ **VJETNAMIO:** Dum sia vojaĝo al sudorienta Azio meze de oktobro Amri Wandel renkontiĝis kun vjetnamaj esperantistoj en Hanojo kaj Ho-Ĉi-Minh-urbo. En Hanojo kunordigis la renkontiĝon Nguyen Xuan Thu, ĝenerala sekretario de Vjetnama E-Asocio. En HCMU li renkontiĝis kun granda grupo, i.a. kun Tran Kuan Ngok, Vicprezidanto de VEA kaj VP de KAEM, s-ino Wu, filino de la fondinto de la E-movado en Vjetnamio, kaj kun pluraj gejunuloj. La renkontiĝo okazis en la „Palaco de la Paco“ kie esperantistoj renkontiĝas ĉiumonate.



◆ **INSTRUADO:** La Nederlanda ILEI-Sekcio, NGGE, okazigis la 4-an de oktobro 2008 sian tradicion Studotagon en la Andreo Cseh-Domo, sidejo de la Internacia Esperanto-Instituto, en la urbo Hago. Ĉi-jare la ĉefpreleganto estis Stano Marček, redaktoro de la revuo *Esperanto* kaj aŭtoro de la verko *Esperanto per rekta metodo*. Li vigle prezentis la 20 versiojn de sia metodo en diversaj lingvoj kaj ankaŭ la vastan serion de akompana materialo: sondiskoj kun modela parolado, fabeloj, bildoj ktp.

S-ino Kasia Marciniak, Sekretario de UEA, prezentis Pollandon, la landon de la sekvaraj someraj E-aranĝoj (Universala Kongreso kaj ILEI-Konferenco) kaj Atilio Orellana Rojas vokis la atenton de la ĉeestantoj al la projekto iniciatita de Vladka Chvátalová pri subteno al orfoj en Benino.

Atilio Orellana Rojas
NGGE-Sekretario

◆ **TOLKIEN:** En la virtuala mondo Dua Vivo spekteblas tre interesa kaj serioza prelego de Anna Löwenstein pri Tolkien. Ĝi estas tre zorge redaktita kaj abunde ilustrita de Emilio Cid el Brazilo. La prelego spekteblas ĉe: <http://parolumondo.com/2008/06/15/ringoj/>.

◆ **BOCIORT:** Post la pasintjara impona volumo E-lingva *Esperanto: Movado. Strategio. Estetiko. Rakontoj* (Timișoara, 652p.), la rumana profesoro, nun loĝanta en Germanio, regas sian legantaron per nova, same impona rumanlingva volumo aperinta ĉi-jare ĉe la eldonejo Arpeggione (Cluj-Napoca; 660p.) kaj titolita *Convingeri, opinii, atitudini* (Konvinkigoj, opinioj, sintenoj). Triono el la libro (kaj ĉiuj fotoj en ĝi) estas dediĉita al Esperanto, kaj kovras 30 jarojn da poresperanta agado de la aŭtoro, kaj en Rumanio kaj ekster ĝi.

I.O.



100 jaroj
universala
esperanto-
asocio

Tra la mondo

La 40-a Korea Kongreso

La 18-an kaj la 19-an de oktobro 172 esperantistoj el 5 landoj (Koreio, Ĉinio, Finnlando, Japanio, Nepalo) partoprenis en la 40-a Korea Kongreso de Esperanto, okazinta en Ohmyland Busan (refreŝiga ripozejo por junuloj).



La kongresa ĉeftemo estis *Esperanto en perspektivo: en la nova ondo de monda civilizacio*. Inter la ĉeestantoj troviĝis la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller, invitita de Korea Turisma Organizo. Li vizitis la urbon Busan ne nur por partopreni la kongreson, sed ankaŭ por taksii la kondiĉojn de ĉiuj vidpunktoj, rilate al la eventuala okazigo de Universala Kongreso en la urbo iam en baldaŭa jaro.

Kadre de la kongreso okazis simpozio sub la kongresa temo. Laŭ la prezido de Ho Song, vicprezidanto de KEA, kvar anoj surpodie prelegis kaj diskutis: Park Yongsung, sekretario de la Busan-Kyeongnam filio de KEA, starigis demandojn por alvoki pli aktive pensi pri la E-movado, montrante ekzemplojn de fiŝkaptado surekrane; Kawanisi Tetsurou, estro de Isikawa Esperanta Asocio, prezentis la E-movadon de Isikawa Esperanto-grupo. Li akcentis la bezonojn de aktiva E-lernado, reciprokecon de amikecaj kaj kulturaj interŝanĝoj kaj informadon al „ne-Esperantujo“ pri Esperanto; Peng Zhengming, vicprezidanto de Wuhan Esperanto-Asocio kaj konstanta konsilanto de ĈEL, prezentis la aktualan E-movadon en Ĉinio kaj informis pri la revigligo de E-movado en Ĉinio, t.e. multiĝo de junaj lernantoj, aktivuloj kaj interretaj hobiemuloj en Esperanto; Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de

UEA, retrospektive raportis pri la E-movado de ĝia naskiĝo ĝis la nuna stato tra la malfaciloj. Laŭ li ni plenumadis niajn taskojn kaj prenadis respondecojn, kaj ni klopodas por ke homoj elektu Esperanton.

En la kongreso troviĝis fakaj kunsidoj por anoj de la Azia E-movado, katolikoj, kristanoj, oomotanoj, ŭonbulismanoj, vegetaranoj, KEA-redakcianoj ktp.

En du kongresaj universitatoj prelegis Kwak Jonghun (prez. de KEA-deputitaro) pri *Esperanta kulturo en Koreio kaj Korea kulturo en Esperanto*, kaj Osmo Buller pri *UEA kiel reprezentanto de la esperantistaro en mondaj forumoj*. Kwak Jonghun kronologie retrorigardis la historion de la Korea E-movado. Osmo Buller skizis la 100-jaran historion de UEA kaj prezentis la interrilatojn kaj kunlaborojn inter UEA kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, t.e. UN, Unesko kaj la iama Ligo de Nacioj.

LKK eldonis du specojn da biletoj kun la portreto de L.L. Zamenhof, nome 1 000 spesoj (valora ĉ. 0,6 eŭrojn) kaj 500 spesoj (valora ĉ. 0,3 eŭrojn), kaj donacis al ĉiu kongresano po 2 000 spesojn. Oni povis ĝui tiom da rabato per la biletoj en la libro-servo aŭ vendejo dum la kongreso. Furoris verda ĉemizo, kiun LKK faris kiel memoraĵon pri la 40-a Korea Kongreso de Esperanto. Multaj ĉeestantoj laŭdis LKK-n pro la pena laboro por la sukcesa kongreso. **Kim Uson**



Fotoj: Kim Yongjin

La 95-a Japano

La 95-a Japano Esperanto-Kongreso okazis en la urbo Wakayama, de la 11-a ĝis la 13-a de oktobro 2008, kun 476 partoprenantoj, inkluzive de 17 alilandanoj el naŭ landoj.



La ĉefa temo estis *Regiono kaj la mondo – Diverseco, Renkonto, Disvolviĝo*. Du publikaj programeroj estis ĉefe plenumitaj kunlabore kun la loka Wakayama Unesko-Asocio. La unua, memore al la Internacia Jaro de Lingvoj, estis la simpozio *Kial nun, Internacia Jaro de Lingvoj – Lingva diverseco kaj kulturo de dialogo*, en kiu prelegis la konsilanto el la oficejo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko en Parizo Hattori Eiji. La dua estis la evento kun ĉirkaŭ 100 ĉeestantoj, kiuj kantis *Sonorilon de l' Paco* en Esperanto kaj sonorigadis grandan sonorilon en la gubernia nacia heredaĵo Jiŝodo, preĝante por ke ne plu estu milito en la mondo.

Egawa Harukuni

Unuigitaj per la reto

En la ĉina urbo Foshan la 17-an de oktobro okazis lerneja eksperimento, ene de la kurso de Esperanto ĉe la Altlernejo pri Porprofesiaj kaj Teknikaj studoj, kun partopreno de 50 gelernantoj de la kurso, inter kiuj lernas kelkaj profesoroj.

Profitante la bonajn teknikajn eblojn de la lernejo oni aranĝis retribiladon kun pola esperantistino Grażyna el la urbo Toruń. La junaj gelernantoj (16-20-jaraj) havis la okazon paroli kun ŝi pere de la reto, kaj eĉ vidi ŝin sur giganta ekrano. Ŝi kaj la gelernantoj interŝanĝis salutvortojn, faris facilajn demandojn, kaj ŝi eĉ povis rigardi kiel oni instruas Esperanton al la gejunuloj. Granda surprizo estis



Arto-ŝoko
Unika lingvokurso-programo
surbaze de la vivo kaj arto de la
pentristo
Vincent van Gogh.
En Le Touquet - Paris Plage
(Norda Francio).
Inter la 4a kaj 9a de julio 2009
36-hora intensa kurso
ekde komencinta nivelo kun
Katalin Kováts & Sylvain Lelarge.
Pliaj informoj ĉe katalin@ikso.net

kiam sur la ekrano aperis brazila esperantisto Silvio Kniess, kiu ankaŭ ekbabilis kun ili. Ĉiuj, ĉefe knabinoj, estis ravitaj de li, alta, bonhumora, belaspekta. Por ili unuafoje en la vivo estis la eblo babiladi kun eksterlandanoj, kio kuraĝigis ilin en la lernado de Esperanto. Poste la lernantoj povis rete babiladi kun la franca esperantisto Michel Fontain. Ankaŭ loka televido ĉeestis la eksperimenton kaj favore raportis pri ĝi. Sekve oni decidis dufoje ĉiusemajne ripeti tiun interesan kaj allogan eksperimenton kun alilandaj samideanoj.

Onidire Esperanto estas lingvo malfacile lernebla por ĉinoj, sed tio tute ne validas por ĉi tiu kurso. Junaj homoj ja facile lernas, rapide adaptiĝas al prononcado de nova lingvo. Mi estas ege kontenta kaj kortuŝita instrui tiujn afablajn, ĝentilajn, laboremajn gejunulojn. La etoso en la klasĉambro estas tre amikeca kaj gaja. La organizantoj de la kurso, s-roj Jin Peng (lernejestro) kaj Liu Weizhuan (Ĝenerala Sekretario de la Kantona E-Asocio), deziras ke tiuj kursoj daŭre okazu.

Augusto Casquero



Valeriano Casado Noguerol (1925-2008), sacerdoto, mortis la 16-an de oktobro en Osorno (Ĉilio), kie li estis delegito.



Bernard Golden (1925-2008) forpasis la 19-an de oktobro en Veszprém (Hungario). Li naskiĝis en Usono, sed ekde 1971 li vivis en Hungario, edziĝinta kun hungarino. Li estis arkeologo kaj laste laboris en la Muzeo de Bakony en Veszprém ĝis sia emeritiĝo en 1985. Li estis eksterordinare produktema aŭtoro, de kiu aperis pli ol 1800 artikoloj, recenzoj, beletraĵoj kaj tradukoj. De 1976 ĝis 1981 li prizorgis por tiu ĉi revuo la popularan instruon-amuzan rubrikon „Ekzameno E”. Li estis multfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA, i.a. per la premio „Nova Talento” en 1976. Ĉe la Internaciaj Floraj Ludoj li gajnis la titolon „Florluda Majstro”. Li publikigis libroforme la rakontarojn *Hieraŭ – hodiaŭ – morgaŭ* (1982), *Bestoj kaj homoj* (1987) kaj *Sango, sekso kaj scienco* (1993), la romanetojn *Infero en aŭtuno* (1993) kaj *Ŝamanoj en la kosmo* (1994), kaj la teatraĵaron *Antaŭ la kulisoj* (1994). Golden, kiu lernis Esperanton en 1946, estis membro de la Akademio de Esperanto 1983-2001 kaj gvidis ĝian sektion pri Ĝenerala Vortaro 1984-1998. Li membris en la estraro de Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo 1981-1986. Parto de liaj prilingvaj artikoloj kaj konsiloj aperis en la libretoj *Marĝene de la lernolibro* (1982) kaj *Kompletege al la lernolibro* (1990). Al la 20-lingva, pli ol 1600-kapvorta muzeologia terminaro *Dictionarium museologicum* (1986) li kontribuis la Esperantan parton. Golden aliĝis al UEA en 1958 kaj estis dumviva

membro ekde 1968. Li estis longe ankaŭ fakdelegito pri arkeologio, esperantologio kaj interlingvistiko.



Josef Hradil (1924-2008) mortis la 26-an de oktobro en Mnichovo Hradiště (Ĉeĥio), kie li ekde 1962 estis delegito kaj fakdelegito pri ĝenerala kaj interna medicino. Li havis pensionon, kiun li ofte disponigis al Asocio de E-istaj Handikapuloj. Li aktivis en Universala Medicina E-Asocio kaj longe gvidis la medicinistan sektion de Ĉeĥa E-Asocio, redaktante ties bultenon *Medicinistaj Informoj* kaj poste la revuon *Sano*. En 1979 li aperigis *Esperanta medicina terminaro*, kiun li daŭre kompletigis; la 5-a eldono aperis en reta versio en 2008.

Ono Takao (1961-2008), konata kiel Taon, mortis la 11-an de oktobro en Jokohamo. Li estis fakdelegito pri komputiloj, programado kaj komputila muziko, kaj kreinto de la pop-bando „La Mevo”, de kiu en 1994 aperis la kasedo *Vizaĝoj*.


Paul Ronald (1925-2008), em. elektroinĝeniero, forpasis la 17-an de majo en Roxboro (Kanado), kie li estis longe delegito kaj fakdelegito pri inĝenierado. Dum pluraj jaroj li estis estrarano de Kanada E-Asocio, i.a. prezidanto 1972-1976.

William (Bill) H. Simcock (1918-2008), em. lernejestro, forpasis la 5-an de novembro en Leek (Staffordshire, Britio). Ekde 1983 li estis delegito en Stoke-on-Trent kaj fakdelegito pri georgismo, humanismo kaj mondcivitaneco. Li aktivis en Tutmonda E-ista Vegetarana Asocio, i.a. kiel vicprezidanto, dum kelka



tempo gvidis E-Asocion de Humanistoj, kaj aŭtoris la kolekton *Humuraĵoj* (1994; 2-a eld. 2000).

Alan Towsey (1917-2008), em. gimnaziestro, forpasis la 8-an de aprilo en Tahmoor (Aŭstralio), kie li estis delegito kaj fakdelegito pri lingvistiko. Esperantisto de 1930, li gvidis multajn E-kursojn kaj redaktis la lernolibron *A translation course in Esperanto for advanced students* de F. Banham (1979; 2-a eld. 1996). Lia ĉefverko estas *Aŭstralia antologio* (1988), kiun li redaktis.



Helmut Welger (1946-2008), advokato kaj psikologo, mortis la 12-an de majo en Marburg (Germanio). Li estis longtempa fakdelegito pri homaranismo, juro kaj psikologio. Sub la ŝildo Info-Servo li eldonis i.a. *Tutmonda Esperantista Adresaro* (1981), *Kontribuoj al la norma esperantologio* (1994), *Homaranismo* (1985; 3-a eld. 1996) kaj *Survoje al pontokulturo* (1987). Li evoluigis „kosmopolitan humanismon” kiel renovigon de la Zamenhofa homaranismo. En 1985 li lanĉis Marburgan Manifeston pri la taskoj de la E-movado, esperantismo kaj homaranismo kaj surbaze de ĝi iniciatis la fondon de Homarana Asocio, kies prezidanto li fariĝis.

- A** bolskaja, M. 166
 Abontarifoj 238
 Administrado 142
 Afriko 24, 37, 120, 129, 135, 212
 Alberich, F.J. 166
 Ago-Semajno 34
 AIS 257
 Akordo 188
 Al-Amily, H. 111
 Ameriko 114, 135, 198
 Andreev, I.J. 166
 Anoncetoj 234, 256, 259
 Antanaitis, A. 149
 Arabaj landoj 136
 Arakeljan, H. 43
 Arakeljan, K. 43, 189
 Ardo 109
 Argemí i Roca, A. 196
 Auderskaja, T. 257
 Aŭstrio 4, 37, 85, 236, 257
 Avo Frosto 254
 Azia Agado 136
- B** aghy, J. 6
 Bakker, H. 55, 101
 Baláz, P. 34, 195, 213
 Barato 12, 92
 Barnes, R. 121
 Becker, U. 214
 Belartaj Konkursoj 83, 182, 230, 231, 249
 Belgio 85
 Bengalio 85
 Benino 212
 Berjoza, A. 126
 Berveling, G. 88, 111
 Bibliotekoj 4, 9, 16, 157, 160, 236
 Biondi, A. 121
 Blahuš, M. 12, 180
 Blanke, D. 9, 54, 68, 180, 221, 249
 Blanke, W. 5, 68
 Bloem, R. 121
 Bociort, I.F. 257
 Bolt, R. 160
- Bona Espero 68
 Bondin, V. 118
 Bosnio kaj Hercegovino 257
 Bourgois, L. 166
 Braha, M. 166
 Brazilo 36, 44, 68, 109
 Brever, S. 99, 107
 Bronštejn, M. 126, 127, 158
 Brown, N. 214
 Buller, O. 66, 70, 109, 114, 115, 128, 152, 165, 166, 178, 219
 Burayzat, M.S. 197
 Buremo, K. 214
 Bute, A. 11
- C** amacho, J. 16, 53, 86, 87, 110, 111, 232
 Canuto, G. 100
 Casado, V.N. 260
 Casquero, A. 210, 259
 Castro, M.P. 137
 Cayley, M. 111
 Centra Oficejo 10, 32, 66, 88, 128, 208, 219, 230, 231
 Chapman, A. 31
 Chrdle, P. 235, 237, 246, 247
 Cid, E. 257
 Collodi, C. 112
 Corsetti, R. 52, 111, 123, 202, 222
 Costa, F.D. 94
 Cramer, M. 247
 Cumbelic-Rössum, K. 238
- Ĉ** eĥio 37, 45, 235, 237, 246, 247
 Ĉeĥov, A. 16
 Ĉinio 85, 109, 116, 235, 259
- D** anio 36, 235
 Dasgupta, 3, 30, 56, 76, 121, 185, 250
 Davies, S. 160
- Deelder, J. 200
 Demmendaal, L. 8, 200
 Denis, P. 116
 Dijk, Z. van 1, 2, 39 10, 13, 63, 98, 171, 175, 176, 178, 183, 190, 221
 Diplomoj 202
 Dočekal, M. 213
 Dua Vivo 257
 Duoble Unu 112
- E** @I 124, 125, 199, 246
 Ebert, G. 238
 edukado.net 180
 EEU 137
 Egawa, H. 259
 Eisen, F. 126
 Ekspozicioj 93
 Eksteraj rilatoj 134
 Ekonomia Forumo 195
 Ekzamenoj 108
 Elbakjan, A. 43
 Elbakjan, L. 43
 Else, N. 39
 Erasmus, H. 105
 Eseo 182, 249
 Esperantologio 180
 Espinosa, R. 121
 Esploro kaj dokumentado 140
 Estraro de UEA 130
 Eŭropa Referenc-kadro 33, 108
 Eŭropo 137
 Evlogieva, M. 149
 Expolingua 21
- F** abelkonkurso 83
 Fajrovulpo 13
 Faka agado 99, 132, 246
 Ferenczy, I. 81
 Fervojistoj, IFEF 106, 180
 Festivaloj 34, 45
 Fettes, C. 203
 Fighiera, G.C. 225, 226, 249
 Filmo 183
- Fleury, N. 254
 Fondadoj: Canuto 13, 96
 Forumo 222, 223, 248
 Forpaso 35, 94, 166, 214, 238
 Fournier, G. 238
 Francio 116, 165, 166
- G** allmo, G. 110
 Gandhi, M. 79
 Gaus, J. 31, 213
 Gazzola, U. 121
 Gbeglo, K. 37
 Germanio 13, 21, 36, 109
 Gerson, M. 166
 Gijn, G. van 94
 Giri, A. 94
 Girona Ribé, J. 238
 Gishron, J. 94
 Gobbo, F. 206
 Goes, H. 11, 39, 159, 203
 Golden, B. 260
 Goninaz, M.D. 87
 Google 12
 Gotoo, H. 249
 Graf, V. 196
 Grattapaglia, U. 190
 Grin, F. 121
 Guevara, N.D. 42
 Gulyás, I. 180
 Gutiérrez, Gonzáles, M. 69, 114, 198
- Haddad, D. 158
 Harlow, D.J. 94
 Harry, R. 250
 Hasecke, B. 94
 Hauser, P. 172, 174, 177, 180, 181, 187, 188, 189, 190
 Henrique, F. 36, 109
 Hernández, A. 42
 Hispanio 93
 Hodler, H. 77, 251
 Hofstätter, G. 238
 Homaj rajtoj 250
 Honoraj membroj 202
- Hori, J. 92, 188
 Horváth, J. 112
 Hradil, J. 260
 Hungario 108, 117, 220
- H** oĥlov, N. 87
- I** nfanio, IIK 190, 224, 225, 226
 Informado 131, 134, 135, 140
 Instituto Hodler 251
 Instruado, ILEI 31, 70, 90, 129, 131, 135, 136, 206, 212, 213, 257, 259
 Interlingvistiko 80, 132, 151
 Internacia Jaro de Lingvoj 7, 19
 Internacia Kongresa Universitato 129, 151, 166, 211
 Internacia Semajno de Amikeco 18
 Interreto 124
 Irano 43
 Isaev, M. 126
 Isbrucker, J. 201
 Isikawa, P. 212
 Israelo 45, 180
 Italio 85
 Ivanova, Ĥ. 238
- J** ansen, W. 201
 Japanio 259
 Jarfina indekso 251
 Jarlibro 19
 Jasuo, H. 92, 188
 Jegorovas, P. 12
 JoMo 188, 220
 Jordan, D.K. 40
 Junularo, TEJO, IJK 44, 141, 180, 220
 Juršenás, Ĉ. 150
- J** urnalismo 147, 148, 180
- K** AEST 246, 247
 Kajto 15
 Kalendaro 58, 85, 115, 153, 227
 Kanado 82, 198, 254
 Kanariaj Insuloj 12
 Karucin, K. 166
 Kay, S. 94
 Kaźmierski, T. 230
 Keller, S. 196
 Kerves-van Tholen, E. 94
 Kheir-Khah, R. 37
 Kim, U-song 258
 Kirk, L. 166
 Klag, W. 37, 85, 257
 Kleriga Tago 58
 Kniivilä, K. 149, 170
 Kokmeijer, E. 159
 Kolker, B. 66, 126
 Kolombo, J.M.L. 121
 Komar, H. 117
 Komitato de UEA 141, 178
 Kompaktdiskoj/ DVD: Esperanto 199
 Esperanto estas... 125
 Esperantoland' 125
 Sen lim' ĝis... 112
 Konferencoj 206, 212, 243
 Kongresa Komunikado 104, 244
 Kongresa temo 58, 177
 Kongresoj 8, 58, 70, 82, 165, 166, 169-190, 198, 200, 201, 211, 258, 259
 Kontakto 48, 239
 Koopmans, B. 226
 Koreio 25, 44, 205, 258

Koresponda Servo
Mondskala 96
Korjenkov, A. 149
Kóródy, Zs. 108,
129, 243
Kosiarska, G. 75,
180, 229
Kotiztabelo UEA
46, 204
Koutny, I. 151, 202
Kratzmann, R. 214
Kroatio 20
Krucenigma
konkurso 22, 142,
251
Kruusalu, V. 214
Kubo 42, 69, 70,
114
Kulturo 132
Künzli, A. 202
Kursoj 12, 37, 43,
70, 90, 92, 116

Laiconas, E.J. 94
Lammers, A. 188
Landa agado 135
Lapenna, I. 100
Laste Aperis 17,
41, 65, 89, 113,
161, 209, 233, 255
Laurentien de
Nederlando 200
Lebrun, V. 6
Le, N. 166
Le, T.T. 12
Lehane, J. 214
Lee Chong-Yeong
193, 205
Lee Jung-kee 189
Le Puil, J. 110
Lentaigne, L. 94
lernu! 31, 125, 213
Lewanderska, A.
109Li, E. 37
Libroj (recenzoj)
Afero de Espero.
Konciza historio
de la Esperanto-
movado en Afriko
39
Afrika medicino,
mirige efika, La
38
Aventuroj de
Pinokjo, La 112
Beletra
Almanako 110
Concise
Encyclopedia
of the Original
Literature of
Esperanto 252

Conversational
Esperanto
/ Ĉiutaga
Esperanto 40
Ĉeriza ĝardeno
16
Dharmo-pado,
La 110
Dio, psiĉjo kaj
mi 158
Flambirdo, La 86
Kaj staros tre
alte... 86
Ksenofobia
gvidlibro al la
nederlandanoj
160
Lasta tago de l'
poeto, La 232
Letero al la
Korintoj 88
Lingvokul'turo-
logičeskie aspekty
planovych
mejdunarodnych
jazykov 87
Lingvo serena,
La 253
Lokomotivo, rulu
nun! 15
Mia vojo.
Versaĵoj. 87
Mummy, why
can't we all
speak the same
language? 39
Sendependaj
homoj 15
Summary of the
World, A. 159
Trezoro, La 111
Libroservo 66,
188, 201, 232
Lieberman, E.J. 99,
107
Ligo de Nacioj 76
Lingvaj (homaj)
rajtoj 123, 197
Lins, U. 76, 97,
100, 126, 171
Lipari, M. 85, 157,
231
Litovio 12, 145,
147, 148
Loke, Fake,
Persone 12, 36,
85, 109, 257
Lord, D. 40
Löwenstein, A.
257
LP&LP 48, 238
Lundberg, H. 31,
158

MacGill, S. 15
Madagaskaro 188
Magalhães, C. 109
Magnani, D. 28
Malferma Tago 10,
32, 66, 88, 128,
208, 231
Malferme 3, 27, 51,
75, 99, 123, 147,
171, 195, 219,
243.
Malto 118
Malvo 188
Mandrak, S. 92
Marček, S. 22, 28,
132, 180, 201,
219, 251
Marmou, R.-J. 214
Marsman, H. 201
Matsuura, K. 7,
173
Maurelli, F. 203
Maŭritanio 197
McCoy, R. 189
Medicinistoj 81
Menger, T. 13
Miranda, E. 69
Moerbeek, R. 13
Monda Socia
Forumo 196
Mrázek, D. 220
Mullarney, M. 214
Muzeoj 236, 237

Nederlando 1,
8, 63, 105, 109,
160, 169, 184,
200, 206, 208, 257
Neu, A. 197
Neves, G. 254
Nilsson, I. 214
Nitobe-Simpozio
140
Noe, J. 6
Nomura, R. 94
Nordenstrom, L.
15, 86, 112
Nourmont, C. 4,
56, 83
Novobilský, V. 45
Nov-Zelando 93

Oceanio 93,
139
Oficiala Informilo
19, 67, 91, 115,
163, 211,
Olsson, S. 238
Onet, I. 13, 257
Ono, T. 260

Oratora Konkurso
142, 183
Ördögh, S. 94
Orellana, R.A. 257
Ó Riain, S. 252
O'Ryan, W.D. 94
Osamu, T. 86
Otero, P. 114

Paillalef, F.R.C.
121
Parès, Y. 38
Petrov, D. 214
Petrović, S. 31
Petrović-
Lundberg, S. 206
Pietrzak, B. 27, 52,
186, 187, 223,
245
Pinheiro, C. 44
Piron, C. 49, 51-
57, 132, 158
Poezio 55, 182,
183, 201, 254
Pollando 92, 151,
152, 164, 195,
199, 221, 244
Portugaliao 243
Premioj:
– Deguči 28, 101,
202
– Grabowski 202
– OSIEK 256
Preotu-Maxwell,
M. 214
Privat, E. 14, 76, 79
Prozo 182, 183

Radio 75, 114,
180, 229
Ragnarsson, B. 53,
253
Ranganayakulu,
P.V. 38
Rao, A.G. 12, 58,
177
Rašić, N. 160, 184,
208
Rausek, E. 94
Recenzoj 14, 38,
86, 110, 158, 232,
252
Revill, E. 238
Řezáč, Z. 238
Richter, F. 214
Roether, P. 94
Ronald, P. 260
Rooke, D. 149
Rumanio 11, 13
Rusio 165
Ryan, D. 93

Salunionis, G. 149
Sandner, T. 13
Sarandrea, C. 28
Schröder, I. 36,
235
Schubert, A. 197
Schumann, B. 224,
226
Scienco, ISAE
129, 247
Sekelj, T. 101
Semajno de homaj
rajtoj 42
Semajno de
Internacia
Amikeco 30
Shulin, D. 94
Simcock, W. 260
Simpozioj 69, 221
Skutnabb-Kangas,
T. 121
Sloper, M. 112
Slovakio 213
Smideliusz, B. 220
Smith, C. 21, 31
Socia Forumo de
UN 196
Sovetunio 126
Spezokonto 137
Steele, T. 86
Subvencioj:
– Cigno 202
Sutton, G. 252
Svislando 121, 123
Szilvási, L. 247

Ŝilas, V. 149
Štimec, S. 20

Tago de la
gepatra lingvo 27
Tajvano 37
Teatro 182, 183
TEJO Tutmonde
48, 239
Tellier, A. 39
Thorsen-apogo 16,
160
Thune, L. 238
Togolando 37
Tolkien 257
Tomášek, J. 106
Tonkin, H. 9, 51,
147, 174, 182,
248
Torres, Y. 42
Towsey, A. 260
Tra la mondo 20,
44, 212, 236, 258
Tsirimokos, A. 85

UEA 10, 32, 66,
73, 76, 84, 88, 97,
100, 115, 126,
128, 171, 198,
202, 204, 208,
197, 219, 222,
231, 243, 244, 248
Ukrainio 257
Unesko 7, 70, 134,
173
Universala
Deklaracio de
Homaj Rajtoj, La
250
Universitatoj 34,
37, 80, 151, 206
Unuigintaj Nacioj
121, 123, 134, 196
Usono 9

Vegetarismo,
TEVA 203
Vergara, J.A. 82,
99, 107, 246, 247
Veronese, D. 94
Veuthey, F. 201,
219
Vikipedio 13, 125,
246
Vikiversitato 246
Vjetnamio 12, 109,
141, 257
Vojáček, J. 37, 207

Wandel, A. 34,
45, 57, 85, 257
Wei S. 85
Welger, H. 260
Wennergren, B. 31
Wey Y. 116
Wierzbowski, P.
152, 164
Williams, J.T. 94

Yagy, H. 102
Zaleski-
Zamenhof, L.C.
176
Zamenhof, L.L.
245
Zamenhof-Tago
42, 43
Zasaité, N. 31
Zdankowski, M.
256
Zecchin, A. 88
Zedníková, S. 238



RETORIKO

Science redaktita, pense riĉiga verko de Ivo Lapenna. Roterdamo, 1971 (tria eldono). 294p. 20cm. Bindita kun kromkovrilo. Prezo: €19,80. Triona rabato ekde 3 ekz.



ESEJOJ MEMORE AL IVO LAPENNA

Fascina mozaiko de personaj rememoroj pri la arkitekto kaj konstruinto de la moderna UEA. Kopenhago, 2001. 417p. 25cm. Kun kompaktdisko. Prezo: €45,00. Triona rabato ekde 3 ekz.




- 1: *E-o kiel lingva esprimo kaj instrumento de humaneca internaciismo* (1987); *Lingva diskriminacio* (1964)
- 2: *100 jaroj de parola E-kulturo* (1987); *Parolado dum la solena inaŭguro de la monumento La Espero en Graz* (1987)
- 3: *Renkonte al la 100-jara Jubileo de E-o* (1981); *La rezolucio de Unesko, Montevideo* (1954)
- 4: *Komunikado kaj homaj rajtoj* (1984); *Kultura valoro de la Internacia Lingvo* (1954)
- 5: *La Jaro de Internacia Kunlaboro – La Jaro de Internacia Lingvo* (1964); *La Internacia Jaro de Edukado* (1970)

Prezo de unu disko: €13,50 (+ imposto en EU 19%; sendokostoj 10%, minimume €4,00). Sesona rabato ekde tri ekzempleroj.




Hamburgo en retrospektivo. Ivo Lapenna. Kopenhago: Horizonte, 1977 (tria kompletigita eld.). 11+151p. 21cm. Interpreto de la aŭtoro pri sia forlaso de UEA en 1974. Prezo: €16,50. Sesona rabato ekde 3 ekz.



Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo. Ivo Lapenna. Roterdamo, 1952. 144p. 20cm. Fundamentaj nocioj – Lukto por la paco por juraj rimedoj – Internaciaj organizaĵoj. Prezo: €8,40. Sesona rabato ekde 3 ekz.

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.



HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 9,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

RESPONDOJ PRI RASISMO

"Infano estas scivolema. Ĝi faras multajn demandojn kaj ĝi atendas precizajn kaj konvinkajn respondojn. Per ĉi tiu libro mi provas respondi la demandojn de mia filino. Ĝi celas la infanojn kiuj ankoraŭ ne havas antaŭjuĝojn kaj volas kompreni. Pri la plenkreskuloj, kiuj ĝin legos, mi esperas ke ĝi helpos ilin respondi la demandojn, pli embarasajn ol ni kredas, de siaj propraj infanoj." (Tahar Ben Jelloun)

Tiu ĉi libro de la Marok-devena aŭtoro enorme furoris en Francio. En 1987 Tahar Ben Jelloun gajnis la prestiĝan Premion Goncourt.



PAĈJO, KIO ESTAS RASISMO? Tahar Ben Jelloun (1944). El la franca trad. Armela LeQuint kaj Jak Le Puil. Rotterdam: UEA, 1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8. 19cm. Prezo: € 6,30. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

ENKONDUKO AL DEMOKRATIO



Du elstaraj britaj fakuloj klarigas en ĉi tiu gvidilo de Unesko okdek el la plej premaj demandoj pri la esenco, celoj kaj funkciado de demokratio. La demandoj estas aranĝitaj en ses sekcioj: bazaj konceptoj kaj principoj; liberaj kaj justaj elektoj; malferma kaj respondeca regado; rajtoj de unuopuloj kaj

ilia defendado; demokratia socio; la estonteco de demokratio. Bonega kaj klara enkonduko en la plej gravan politikan koncepton, uzebla kiel lernolibro aŭ baza konsultlibro. Bela grafika vesto kun spritaj ilustraĵoj de Plantu, ĉef-desegnisto de la franca ĵurnalo *Le Monde*.

KIO ESTAS DEMOKRATIO? 80 demandoj kaj respondoj. David Beetham kaj Kevin Boyle. Ilus. Plantu. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA, 2000. 143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Prezo: € 9,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

PASPORTO AL LA TUTA MONDO

La plej interesa, ĝinda, spektenda filmo en Esperanto!



Simple, ĝi estas:

- *via persona instruisto—pacienca, bonhumora, ĉiam preta;*
- *tre amuza historio kun interesaj kaj buntaj roluloj;*
- *16 lecionoj, ĉiu duon-hora, kiuj traktas gramatikon kaj vortprovizon per spritaj kaj facilaj dialogoj.*



Inkluzivas:

- *ekzercojn por ĉiu leciono;*
- *printeblajn dosierojn de la lecionaj tekstoj;*
- *subtitolojn (subtekstojn) kiuj klarigas la konceptojn.*



Subtitoloj (subtekstoj) en la jenaj lingvoj:

angla, ĉina, franca, germana, hispana, hungara, itala, japana, korea, malta, persa, portugala, rumana kaj rusa.

Ĉe la Libroservo de UEA.

Prezo: € 75,00.

Sesona rabato ekde tri ekzempleroj.